HUNGARA VIVO

6
1978
3 Ft

PANNONIA Eksterakomerca Entrepreno de UZINOJ CSEPEL

Budapest, VI., Bajza u. 26. 1062
Telegramadreso: PANEXPORT Budapest
Telefono: 228–850. Teletajpilo: 225128 PANEX–H,
Poŝta adreso: Budapest, P. f. 354. 1394

HUNGARA VIVO

Revuo de Hungara Esperanto-Asocio
Adreso: Budapest
VIII. Kenyérmező u. 6. H–1081
Poŝta adreso: Budapest
Pf. 193 H–1368
Aperas dumonate
XVIII. jaro 1978. Nro 6 (82)

ENHAVO

Abonyi-Nagy, Á.: Esperanto kaj teatroo 202
Lagrange, G.: Pri la teatra lingvo 206
Abonyi-Nagy, Á.: Jadwiga Gibczyńska 208
Draĵev, K.: 20 jaroj de Bulgara Esperanto Teatro 209
Fejes, M.: Esti utila (Intervjuo kun K.Pieńkiewicz kaj Z.Dobrzynski) 210
Benczik, V.: Revuo de Esperantaj teatroj 213
Mihalkov, G.: Unika fenomeno (Pri Esperanta pupteatro) 214
Halász, Z.: Ĉapitroj el la historio de la hungara popolo 6.(VHZS) 216
Balbin, J.: Viaj miaj 218
Hules, B.: Tri ludoj, Fabelo pri la juĝistoj 218
Rados, P.A.: Adiaŭ, Milda Poeto! 219
Farkas-Tatár, É.: Panoramo 220
Fenyvesi, E.: Revuo de revuoj 222
Somogyi, L.: Tridek jaroj de la hungara filmarto (V.B.) 223
Rados, P.A.: Eblaĵoj en Esperanto 224
Farkas-Tatár, É.: Miraklo per elektroniko (Intervjuo kun A.Rajnai) 225
D-ro Ferenc, L.: Tri jardekoj de la ŝtata akvomastrumado (A.Pechán) 228
Heide, Z.: La sangokolora maro 234
Duc Goninaz, M.: Atestaĵo pri granda laboro 236
Rados, P.A.: *Benczik*, V.: Recenzoj 237
Krucenigmo 238
Enhavtabelo por 1978 239

Ne kredu, ke...

la kolorfoto sur la kovrilpaĝo estis farita dum teatra vespero de iu el la lastaj Universalaj Kongresoj: niaj trupoj ankoraŭ longe devos kontenti je scenejoj multe pli modestaj, eĉ se en la nuntempa teatra arto ekzistas tendencoj kun prefero al buntaj, allogaj dekoraĵoj.

Sed tia kolorriĉo tamen mankas en teatroj: nia titolpaĝa foto estis prenita el elektronike registrita prezentaĵo (mi ne kuraĝas nomi ĝin „filmo") de la Hungara Televido. Pri tiu ĉi moderna – kaj malmultekosta – maniero de bildregistrado legeblas intervjuo sur la paĝo 25.

Tiun ĉi numeron esence ni dediĉas al la Esperanta teatra arto, kiu ŝajnas vivi nuntempe renesancon. Ni klopodis prezenti la temon el pluraj aspektoj, kaj – eĉ se la bildo ne povas esti kompleta – ĝis nun mankis pli detala pritrakto de tiu ĉi faceto de la Esperanta kulturo. Ni vartas la esperon, ke aliaj revuoj sekvos nian ekzemplon, vekante la intereson pri la arta aplikado de la parolata Esperanto, stimulante kaj rekonante la agadon de niaj sinoferaj aktoroj.

Eble pro la abundo de priteatraj artikoloj tiu ĉi numero povas ŝajni unukolora – eble tiun ĝian econ fortigas ankaŭ artikolo pri la hungara filmarto – tamen troviĝas ankaŭ kontribuaĵoj alitemaj, kiel la nova peco de nia serio *Ĉapitroj el la historio de la hungara popolo*, la verŝajne diskutveka *Eblaĵoj de Esperanto* kaj . . . nova longa artikolo pri la medioprotektado, kiun temon kelkaj legantoj trovis jam iom teda. Nu, al ili konfidenca informeto: tiuj artikoloj estas anoncoj, alportantaj ŝatindan enspezon, sen kiu ni ne povus liveri 40-paĝan revuon, foje-foje kun koloraj kovrilpaĝoj, kiuj verŝajne plioftiĝos dum la sekva jaro.

Alvenis la jarfino, kaj nia redakcio volonte ekscius, kiel ĝi sukcesis kontentigi la atendojn de la vastiĝanta legantaro. Kara Leganto! Ĉu vi dediĉus al ni tempeton, prenante poŝtkarton kun la celo informi nin, kiu el la ses numeroj de tiu ĉi jaro plaĉis al vi pleje, kaj kiun vi juĝas la malplej sukcesa? Sufiĉa grandnombra alsendo de tiaj opiniesprimoj multe helpus al ni pli efike plenumi la redaktan laboron dum la sekva jaro. (Tamen, ĉe via prijuĝo *ne* konsideru la kolorajn kovrilojn, kies ekzisto ja dependas nur de la financoj.) Inter la partoprenantoj de tiu prijuĝado, kiel ankaŭ inter la varbintoj de novaj abonantoj ni lotumos libropremiojn.

Ĉar danĝere proksimas ne nur la fino de la jaro, sed ankaŭ la fino de tiu ĉi paĝo, restas al ni nur deziri al ĉiuj abonantoj (kaj abonontoj) de nia revuo

FELIĈAN NOVAN JARON!

Sceno el la unua esperantlingva operprezentado. Moniuszko: Halka.
(Krakovo, 1912.)

Esperanto kaj teatro

Ni ofte parolas, kelkfoje ankaŭ fieradas pri la Esperanto-kulturo, sed preskaŭ senescepte ni pensas pri nia literaturo kaj nur malofte venas en nian kapon ĝia fidela fratino, la teatro, kvankam ties rezultoj dum la pasintaj pli ol ok jardekoj grave kontribuis kaj al la disvastiĝo de la lingvo kaj al la rekonigo de ties kultura valoro.

La penso pri Esperanto-teatro estas apenaŭ pli juna ol la lingvo kaj la tiurilatan unuan impulson donis mem Zamenhof, dirinte: „Sed la plej efika maniero de propagando estus, se oni povus aranĝi migrantan teatran trupon Esperantan ... Tia trupo migrante tra ĉiuj plej gravaj urboj de Eŭropo kaj Ameriko kaj donante ĉie teatran prezentadon de iaj dramoj en Esperanto, aŭ almenaŭ dialogojn kaj kantojn en tiu ĉi lingvo, farus ĉie grandan bruon kaj alportus al nia afero riĉegajn fruktojn, ĉar nenia teoria parolado pri Esperanto povas tiel bone efiki, kiel ludado de dramoj, aŭ almenaŭ kantado en Esperanto." (Orig. Verkaro p. 215.)

La supre cititajn Zamenhofajn pensojn ankoraŭ dominas la tiutempe tute motivitaj vidpunktoj de la propagando, sed dum la postaj jaroj nia teatro baldaŭ trovis ankaŭ aliajn agadsferojn ne nur propagandajn, sed ankaŭ lingvajn kaj kulturajn.

Starto en Smolensk

Jam antaŭ la Kongreso en Bulonjo-sur-Maro okazis ne malkonsiderindaj klopodoj prezenti teatraĵojn dum lokaj kunvenoj en diverslandaj grupoj. Inter tiuj kiel unuan, nia historio notis la prezentadon de „La unua brandfaristo" de Lev *Tolstoj,* laŭ traduko de A. *Burenkov,* kiun junaj amatoroj prezentis la 27-an de sept. 1896, en la rusa urbo Smolensk.

Veran elanon al la disvolviĝo de la Esperanto-teatro tamen povis doni nur la kongresoj. Dum kongresoj kunvenis pli grandnombre esperantistoj kaj nur tio povis certigi ankaŭ la financajn kondiĉojn de teatraj prezentadoj.

La komenca, pure amatora periodo daŭris ĝis la Dresdena kongreso kaj alportis ankaŭ el vidpunkto de la universala teatra historio konsiderindan rezulton: kunludon de diversnaciaj amatoroj en unu teatraĵo. Dum la kongreso en Bulonjo-sur-Maro en la komedio, „Kontraŭvola edziĝo" de Molière la dek rolojn plenumis amatoroj, apartenantaj al naŭ nacioj; aŭ en Cambridge la Dickensan teatraĵon „Bardell kontraŭ Pickwick" pre-

La Operejo en Dresden, kie okazis la prezentado de Ifigenio.

zentis al la kongreso gefiloj de naŭ nacioj. La denombradon ni povus daŭri longe pri similaj kunludoj, sed la afero gravas nur tial, ĉar inter la du mondmilitoj tiun praktikon adaptis ankaŭ niaj plej bonaj profesiuloj, prezentinte novajn perspektivojn ankaŭ al la universala teatra arto pere de Esperanto.

La partoprenintoj de la unuaj tri kongresoj povis ĝui do nur amatorajn teatrajn prezentadojn kaj ĝuste antaŭ sepdek jaroj, en 1908, dum la Kvara Kongreso en Dresden atingis la Esperanto-teatro la tiaman mondnivelon, dank' al la entuziasma laboro de la fama germana aktoro Emanuel *Reicher*. Lia granda merito estas, krom la sursceniigo de „Ifigenio" de *Goethe* kaj la rekono pri la valoro de Esperanto en la teatra arto, ke li unue provis realigi la Zamenhofan planon pri konstanta Esperanto-teatro. Kvankam lia plano tiam ne efektiviĝis, la penso kvazaŭ ruĝa fadeno gvidas nin tra la lastaj sep jardekoj. Baldaŭ, jam en 1911 V.N.*Devjatnin* organizis trupon el amatoroj baze de tiu plano, kaj la trupo jam en 1912 sin prezentis sukcese dum la Krakova Kongreso per la komedio de *Ĉehov* „La urso". Bedaŭrinde tiun iniciaton, kune kun multaj aliaj fiaskigis la eksplodo de la unua mondmilito.

Post Dresden la vojoj de la amatoroj kaj la profesiuloj disiĝis. Dum la aranĝintoj de la pli postaj UK-oj klopodis sekvi la Dres-

Emanuel Reicher.



denan ekzemplon kaj ili sursceniigis helpe de profesiuloj, aŭ almenaŭ kun teatraj lernejanoj perlojn el la mondliteraturo; la amatorojn ni renkontas ĉefe en naciaj kongresoj aŭ en diverslandaj esperantistaj festoj. Al la publiko de la UK-oj unu post la alia estis prezentitaj „La mistero de doloro" de la hispana A.*Gual*, „Kiel plaĉas al vi" de W.*Shakespeare*, „Kaatje" de P *Spaak* kaj „Mazepa" de J.*Slowacki*. Dum la kongreso en Krakovo okazis la unua operprezentado en la historio de Esperanto, „Halka" de *Moniuszko*. Fine en 1913 aperas ankaŭ la unua, originala esperantlingva dramo „Ginevra" de E.*Privat*. Sed la eksplodo de la unua mondmilito metis finan punkton al la esperiga evoluo de nia teatro.

Kabareto en Parizo

Post la paso de la mondtempesto ankaŭ la esperantistaro volis ridi, amuzi, forgesi la dummilitajn suferojn. Ĉi tiu spirito de la epoko miksiĝis kun specialaj francaj tradicioj kaj je analogio de la mondkonata *„Chat Noir"*, sub gvido de R.*Schwartz* naskiĝis en Parizo la fama Esperanta kabareto, la „Verda Kato" (1920). Kvankam la kabareto servis al la Gaja Muzo, tamen pro ĝia literatura nivelo kaj sesjara ekzisto ni povas ĝin rigardi kiel daŭron de la klopodo pri konstanta E-teatro.

Karikaturo pri Alexander Starke en la rolo de „Onklino de Ĉarli."

La reviviĝo post la unua mondmilito sendube estis multe pli baldaŭa ol tiu post la dua, tamen la unua, vere granda sukceso sin atendigis ĝis la 15-a UK en Nürnberg, 1923. Tiu kongreso elstaras ne nur pro eksterordinara riĉeco de sia programo, sed ankaŭ laŭnivele ĝi atingis, se ne superis ĉiujn antaŭajn. Krom la prezentado de „Natan la Saĝulo" estis ankaŭ operprezentado „La majstrokantisto" de R.*Wagner*, kvankam germanlingve; kaj en Nürnberg debutis antaŭ la publiko de UK niaj Julio *Baghy* kaj Mihály *Sárosi* en kabareto de la Literatura Mondo.

La prezentado de „Natan la Saĝulo" estis merito de nia nun 86-jara dojeno de la E-teatro, Alexander *Starke*, tiam juna aktoro ĉe la Urba Teatro en Nürnberg. Li gajnis siajn kolegojn por lerni Esperanton kaj prezenti la faman dramon de G.E. *Lessing*. Post la prezentado Alexander Starke kune kun sia edzino Camilla *Overbeck-Starke*, kun Julio Baghy kaj Mihály Sárosi restis la plej gravaj geaktoroj de la E-teatro dum la intermilita periodo.

Kaj venis la radio

Ĉe komenco de la dudekaj jaroj aperis ankaŭ io nova, kio baldaŭ akiris gravan rolon ankaŭ en nia teatra historio kaj tiam ŝajnis, ke la nova inventaĵo fine trankvilige solvos la aferon de la E-teatro ankaŭ inter la kongresoj.

Tiu inventaĵo estis la radio.

Pere de la radio perdis la signifojn ĉiuj gravaj obstakloj, kiuj malhelpis la ĝisnunajn klopodojn por krei konstantan E-teatron. Krom la vojaĝkostoj, luprezoj de teatroj eblis rezigni ankaŭ pri grandnombra ĉeestantaro. Pere de la radio ankaŭ inter la kongresoj la esperantistaro povis ĝui altnivelajn prezentadojn.

La klopodoj pri konstanta E-teatro tamen daŭris. Aperis nova batalanto por la ideo, Otto *Flatauer*, esperantisto en Berlin, kiu iniciatis kun aktoroj Gustav *Rickelt* (Berlin) kaj Firmin *Gémier* (Paris) krei mondoteatron per Esperanto. Bedaŭrinde Flatauer mortis en 1928 kaj kun li ankaŭ sia plano. Restis do inter la kongresoj – krom amatoraj prezentadoj – la radio, kiu lasta de 1928 ĝis 1937 en Germanio kaj Ĉeĥoslovakio signifas apartan ĉapitron en nia teatra historio.

Inter 1928 kaj 1932 nia germana kaj E-aktoro Alexander Starke ĉe la bavaraj radioj certigis teatrajn programojn por la tiama esperantistaro ĉiun dekan tagon dum tridek minutoj. Lia repertuaro enhavis krom la klasikaĵoj de la mondliteraturo ankaŭ elektaĵojn el la originalaj verkoj de la tiamaj esperantistaj verkistoj.

Ĝuste tiam, kiam la Tria Regno malpermesis E-dissendojn en Germanio kaj pro sia poresperanta laboro A.Starke estis bojkotita ĉe la bavaraj radiostacioj, komenciĝis E-dissendoj ĉe Radiostacio Brno, en Ĉeĥoslovakio. Post eksperimentoj la 31-an de majo en 1932 komenciĝis regulaj elsendoj en Esperanto unufoje ĉiusemajne. Inter la komence informajn karakterojn havantaj programoj baldaŭ aperis ankaŭ kulturaj temoj. Post unujara agado la „Verda Stacio" jam estis tiel pupulara, ke la gvidantoj decidis doni la saman programon en E, kiun ili dissendis nacilingve. Nuraj kelkaj monatoj sufiĉis por konstati: al la pli altaj postuloj povas konveni nur profesiaj geaktoroj. Komenciĝis do kurso ĉe la Radio Brno por profesiaj teatraj fakuloj, el kiu naskiĝis la fama TRAKT (Teatro kaj Radio Aktoroj) el verkistoj, aktoroj, reĝisoroj kaj kantistoj. Ilia repertuaro estis largskala: alternis en ĝi dramoj, komedioj, operoj kaj operetoj.

Kompreneble la sukceson en Nürnberg sekvis sukceso post sukceso. Venis la reprizo de „Ginevra" en Ĝenevo, en la ĉefaj roloj kun geedzoj Starke, Mihály Sárosi kaj Julio Baghy. Poste la grandioza Hamlet – prezentado en Antwerpen en plenumo de flandraj geaktoroj. La 21-an UK-on en Budapeŝto markis la sukcesoj de J.Baghy kaj M.Sárosi. Tre interese estas citi el tiutempa hungara ĵurnalo, kiu parolante pri la Budapeŝta teatra prezentado, tiel skribis: „Granda plenumaĵo kaj tamen modesta komenco kompare kun tiu tempo, kiam al la karaktero de la metropoloj apartenos regulaj prezentadoj en Esperanto ..."

„Onklino de Ĉarli" en Esperanto

En Oxford A.Starke rikoltis sian plej grandan sukceson sur la E-scenejo dum la 22-a UK, en la mondfama farso de B. *Thomas* „Onklino de Ĉarli". Apartan signifon donas al la prezentado, ke la dek roluloj apartenis al ses nacioj, sed el ili estis profesiuloj nur kvar, – inter ili J.Baghy, – la ceteraj ses estis amatoroj. Simile en Paris, 1932, denove kunludis diversnaciaj geaktoroj, inter ili geedzoj Starke kaj J.Baghy en la komedio „Knock" de J.*Romains*. Poste la politikaj eventoj en Germanio grave surpremis la sigelon al nia movado kaj kun ĝi ankaŭ al nia teatra vivo. Ankoraŭ menciinda estas la iniciato de la sveda S. *Malmquist*, ano de la fama Oscar Teatro en Stockholm, kies trupo debutis dum la 26-a Kongreso kaj post unu jaro turneis en Estonio kaj Latvio per du *Strindberg*-teatraĵoj. En Vieno, en 1936, la esperantistaro per gaja opereto adiaŭis la intermilitan Eŭropon, super kiu de tago al tago plidensiĝis la nuboj de la proksimiĝanta tempesto.

Alexander Starke kaj la edzino Camilla Overbeck-Starke en 1945.

Post la dua mondmilito nia movado multe pli malfacile reviviĝis, ol post la unua. La „Verda Stacio" reorganiziĝis, kaj jam en 1947 ĝi komencis denove funkcii baldaŭ per tri operoj riĉiĝinte sian repertuaron. Sed la „Verda Stacio" en 1950 ĉesis.

Kaj jen! En 1951, nia ŝatata aktoro A.Starke reprenis la torĉon el la mano de la „Verda Stacio", kaj li rekomencis sian gravan kulturlaboron en Esperanto. A. Starke kompilis plenvesperan programon sub titolo „Rido de l'Mondo" prezentinte ĝin en 21 germanaj urboj, poste en ses landoj de Eŭropo. En 1958 ankoraŭ en 29 urboj de Danlando kaj Svedio li turneis per tiu programo, kiu entute atingis 60 prezentadojn.

IAT kaj BET

En 1957 ĝojiga informo elektrumis la Esperanto-mondon. Sub gvido kaj reĝisorado de Srdjan *Flego* fondiĝis Internacia Ar-

La lasta sceno el Ifigenio.

ta Teatro (IAT), kaj ĉifoje eĉ la pesimistoj fidis: solvîgis la plurjardeka klopodo pri konstanta E-teatro. Srdjan Flego donis brilan artan programon kaj kiel finan celon li fiksis antaŭ sin aniĝi al la Klubo de la Teatro de Nacioj en Paris. En la repertuaro de IAT alternis klasikaĵoj kaj modernaj verkoj. Malgraŭ tio, ke IAT konstante devis barakti kontraŭ financaj malfacilaĵoj, nekonvenaj scenejoj kaj kontraŭ nia nekomprenema teatra kritiko; ĝia dekdujara laboro estas ĝis nun la plej pozitiva periodo de nia teatra historio.

Nur unu jaron post la fondiĝo de IAT, en 1958, bulgara rondo de esperantistaj geaktoroj fondis BET (Bulgara Esperanto Teatro) en Sofia, kies reĝisoro estis Stefka *Prohaskova* kaj la lingva gvidanto iĝis Kiril *Draĵev*. Post enlandaj prezentadoj la trupo sin prezentis antaŭ internacia publiko dum la 44-a UK en Varsovio, en 1959. De tiu tempo kun pli-malpli grandaj interrompoj ĝis nun ili prezentas de Shakespeare ĝis Machiavelli mondliteraturajn valoraĵojn en vere arta nivelo.

Samtempe kun BET, en Varsovio debutis antaŭ internacia publiko la artista kolektivo de la Esperantista Klubo de Prago: „La Verda Ĉaro de Julio Bagby", gvidita de geedzoj *Seemann*. Ili prezentis la teatraĵon „Pigmaliono" de G.B.*Shaw* kaj la trupo rikoltis grandan sukceson malgraŭ tio, ke en la kolektivo nur geedzoj Seemann estis profesiuloj. El la repertuaro de „La Verda Ĉaro" krom „Legendo pri amo" nepre menciinda estas ankaŭ „Mariŝa" de Fratoj *Mrstik*. La arta gvidantino kaj tradukistino de la prezentitaj verkoj estis Eva *Seemannová-Suchardová*, kiu havis eksterordinaran talenton traduki en dialekto („Mariŝa") kaj en argoto („Pigmaliono") verkitajn teatraĵojn. Cetere ŝi estis la unua en nia literaturo, kiu havis kuraĝon traduki tiun verkon de G.B.Shaw en Esperanton.

Per la skizo pri la plej gravaj klopodoj en la historio de la E-teatro ni proksimiĝas al la nuntempo. Post la malapero de IAT ŝajnis, ke el la antaŭnelonge multkoloraj tendencoj restis por ni sole BET kiel daŭriganto de la penso pri konstanta E-teatro. Sed nia movado denove brile pruvis sian vivkapablon. Apenaŭ unu jaro pasis, kiam en Varsovio Kalina *Pieńkiewicz* kaj Zbigniew *Dobrzyński* informis la ĵurnalistojn pri fondiĝo de Pola E-Teatro „A.Grabowski". Tiu nova dupersona E-teatro apud la pure klasika repertuaro de BET, alportis novan koloron en nian teatran vivon. La apero de TESPA ĉe fino de 1976 per pli moderna tendenco eĉ plikolorigis ĝin kaj ni povas konstati: nun ankaŭ en nia teatra vivo retroviĝas preskaŭ ĉiuj tendencoj, kiuj karakterizas la hodiaŭan teatran arton.

Pli supre iom fanfarone estis menciita la vivkapablo de nia movado, tamen estus neobjektiva ne depreni kelkajn instruaĵojn el tiu mallongeta, tro skiza superrigardo pri nia teatro. Malantaŭ la rezultoj, la plej elstaraj, ĉeestas ankaŭ niaj malfortaĵoj. Sen intenco kritiki nin mem, ni citu sen komento el raporto de nia martirino Helmi *Dresen*, verkita pri la gastrolado de Oscar Teatro en Estonio kaj Latvio en 1935, kiuj vortoj eĉ nuntempe perdis nenion el sia aktualeco: „La esperantista publiko ankoraŭ ne estas grandnombra kaj mankas al ĝi certa celkonscio por povi prezenti tiun forton, kiu praktike devigus la neesperantistojn agnoski la valoron de nia lingvo".

Rilatas la saman problemon la financaj aferoj de nia teatro, pri kiu eminenta aktorino trafe rimarkis: sen mecenato vera teatra vivo neniam povos disvolviĝi. Ŝi sendube pravis, sed solvo pri ĉi tiu grava demando nepre devas veni el inter niaj vicoj, ĉar ekstera monhelpo laŭ rajto de la mono entrudiĝas ankaŭ la teatran programon kaj tiurilate la necesajn spertojn ni jam akiris.

Se ni jam atingis la temon de la programo, ni devas paroli pri la troa abundeco de la tradukitaj verkoj en la repertuaro de nia teatro. Por nia literaturo naskiĝas ŝajne nur poetoj kaj nur malofte prozistoj, sed eĉ esceptokaze ne dramverkistoj. Certe estis tempo, kiam nia lingvo devis pruvi sian taŭgecon per tradukado de mondliteraturaj valoraĵoj kaj riĉigi sian vorttrezoron per klasikaĵoj, sed tutcerte ni jam trapasis tiun periodon. La lingvo fakte jam taŭgas por verki eĉ plej modernan dramon. Ni pripensu: la plej multaj el la klasikaĵoj jam estas konataj. Nia publiko atendus ion novan. Sufiĉas pensi al la sukceso de „Doktoro Rosales"!

Fine, sed ne lastavice ni memoru pri nia teatra kritiko, kiu dum la historio de la E-teatro pli ofte plenumis la rolon de bremso, ol tiun de antaŭeniganta forto. Ni nepre davas ankaŭ tiurilate pasi antaŭen, ĉar la kritiko estas potenca armilo. Ĝia apliko bezonas ne nur fakspertojn, sed ankaŭ vidi la perspektivojn, kaj se necesas, oni senhezite devas subordoni la unuan al la dua! Neniam ni forgesu: kritikistoj ne naskiĝas, sed ili lernas sian metion.

La denombritaj estas nur eroj el tiuj instruaĵoj, kiuj eĉ post supraĵa analizado sin proponas de sur preskaŭ ĉiuj paĝoj de nia teatra historio, tamen neniu kredu ke nia teatro estas malpli altranga ol iu ajn nacia. Tute ne! Ja ankaŭ ties vojoj kondukis tra multaj obstakloj, nekomprenemoj, financaj malfacilaĵoj kaj malbonaj kritikoj. Iasence ni estas komence de tiu vojo. Kaj tial estas necese meti ĉi tiun gravan branĉon de nia E-kulturo en sia ĝusta loko, konsideri ĝian nuntempan situacion kaj la perspektivon, al kiu ĝi devas evolui.

Kiel diris Zamenhof? „Ĉar nenia teoria parolado pri Esperanto povas tiel bone efiki, kiel ludado de dramoj..."

Árpád *Abonyi-Nagy*

G. Lagrange

Pri la teatra lingvo

Teatro estas arto kaj vida kaj aŭda. Ĝia vida parto (lumo, dekoracioj kostumoj, scenoludoj, korpa esprimo . . .) ne estas verdire universala sed almenaŭ ligita kun la kulturo pli ol kun la lingvoj uzataj kaj tial ne rekte koncernas nin ĉi-tie. Ĝia aŭda parto estas ligita kun la lingvo kaj tial starigas la demandon: kio estas teatra lingvo? Kaj pli precize: kia estu teatra lingvo en Esperanto? Postprezentadaj debatoj montris, ke tiu demando ne estas evidenta por ĉiuj, ke homoj ne vidas, kial teatra lingvo havu specifajn ecojn. Mi provos ĉi-sube starigi kelkajn el tiuj demandoj. Malmultajn mi kapablos respondi . . .

Nu, vivanta lingvo konsistas el implikaĵo de pluraj lingvoj kun komuna trunko, t.e. parte komuna vorttrezoro, simila gramatiko, simila fonetiko, sed kun notindaj diferencoj precipe en la vort-uzo kaj frazkonstruo: skriba lingvo povas uzi multe pli ellaboritajn frazojn ĉar oni povas relegi se oni ne tuj komprenis ion. Krome en la parola lingvo mem ekzistas ankaŭ diferencoj geografiaj (dialektaj influoj) klasaj kaj kulturaj: filozofia profesoro ne parolas same kiel malklera helplaboristo.[1] Vortoj estas specifaj, fakaj, nepre karakterizaj de unu medio aŭ klaso kaj ĉi-tiun tuj malkaŝas. Kiel reeĥas tiuj lingvaj faktoj sur scenejo?

Oni tuj apartigu la klasikan teatron, verkitan antaŭ kelkaj jarcentoj plejofte verse, kiu estas tre literatura. En tio la demando estas ĉefe pri metriko. Ĉu tiu versoskemo respegulas la originalon? Ĉu ĝi taŭgas al Esperanta teatro? Kaj ankaŭ, ĉu mi provu redoni la aĥaismojn? Ankaŭ tio kuŝas ekster mia nuna temo.

Nuntempa teatro kompreneble estas verkita en la parola lingvo. Sed ne entube, ĉar la ĉiutaga konversacio estas plena je banalaĵoj, kiuj sursceneje estus nur tedaj. Fakte la komuna ĉiutaga lingvo estas kvazaŭ ĉefstrato rekta kaj glata sur kiu okazadas nenio. Apud tio la perlingvaj artformoj (poezio, kanzonoj, sprito, teatro . . .) estas florbedoj apudvojaj aŭ arbarvojetoj flankaj en kiuj oni ne forperdiĝu sed tamen iom fremdiĝu kaj refreŝiĝu[2]. Sed oni tial *ne* malestimu la banalecon de la ĉiutaga lingvo: ĝi havas la oportunecon de praktika komunikilo. (Oni ne postulas originalecon de telefon-aparato.Tamen, se distingi en Esperanto inter la ĉiutaga banaleco kaj originalaj lingvoformoj, oni jam alstumblas la lingvonivelon de la spektantoj: ĉu la ŝajna fremdeco estas vola efekto de la aŭtoro aŭ nura nescio de la spektanto?

Kiel povas dram-aŭtoro (aŭ tradukanto) ludi per diversaj lingvoniveloj en Esperanto? Per la vorttrezoro, per sintakso pli-malpli ellaborita? Sed ĉu tio „trafas"?[3] En mia traduko de la Justuloj de Camus *(Kamy')* mi klopodis en la 4a akto emfazi tiun diferencon inter Skuratov la polic-direktoro kaj Foka la analfabeta punlaborulo. Ĉu mi sukcesis? Ĉu tio „trafis"? Nur duone. Jam sur tiu tereno estas multe por fari.

Ekzistas alia vortproblemo ĉefe ligita al la komiko: unu el la rimedoj de la pervorta komiko estas la misuzo aŭ misloko de vorto aŭ esprimo. Se mi ekzemple uzas maristan vorton en kuireja cirkonstanco, mi ricevas komikefekton; infanan vorton en plenkreskula buŝo aŭ inverse, tio sonas humure. Sed kondiĉe, ke *oni sciu,* ke tiu vorto estas marista kaj ke oni almenaŭ pasive konu ĝin, ke ĝi ne estu entute fremda. Ĉu tio povas funkcii antaŭ Esperanta publiko? Jen tamen unu ekzemplo: la vortoj „menuo" kaj „programo" estas preskaŭ samsencaj, ili indikas la detalojn de tio, kio estas antaŭvidita. Sed „menuo" estas *restoracia* kaj „programo" estas *spektakla.* Se mi petas „la programon" de kelnero aŭ „la menuon" de teatrolokistino, mi ricevas komikefekton. Sed en Esperanto tiu fonto estas tre malriĉa pro la necerteco de la vortuzo ĉe la parolantoj.

Pli ĝenerale, ĉu literatura aludo, proverbo, tuj elvokiva en nacia lingvo, rekte pasas en Esperanto? Ĉu ekz-e proverbo rekte sentata en la gepatra lingvo „trafas" post traduko? Ĉu la stil-diferencoj estas sentataj de la publiko? Ĉu la volajn bombastajn efektojn de W. Auld en „Kvazaŭ birdoj . . .[4]„ la publiko ricevas?

En tiuj demandoj mi neniel kulpigas Esperanton pro nekapableco mem krei teatran lingvon: fakte kulpas la nematureco kaj nesufiĉeco de la Esperanta publiko. Tio ankaŭ ne signifas, ke oni verku „facilan" teatron – tion oni jam tro multe faris – por plaĉi al la eternaj komencantoj: se ni volas, ke Esperanto estu respektata kiel plenmatura lingvo ni klopodu uzi ĝin kun matureco. Sed ni konsciu, ke restas tre multe por fari kaj flanke de la aŭtoroj (tradukantoj) kaj eble eĉ pli multe flanke de la publiko.

* * *

Ni ĝis nun konsideris la teatran lingvon nur flanke de la aŭtoro (tradukanto), t.e. kabinet-lingvo mute nur papera. Sed teatraĵo, same kiel simfonio naskiĝas el la kuniĝo de du artistoj: la kreanto (dramverkisto – komponisto) kaj de la interpretisto (aktoro – muzikisto) kaj la duaj povas fuŝi ĉefverkon aŭ valorigi mezbonan kreaĵon. Ni do ĉi-tie trafos duan aspekton de teatra lingvo, la parolan, la aktoran.

Estas evidente, ke teatra trupo havu „perfektan", modelan pronocon, tiom pli ke Esperanta teatro ludas nuntempe le saman rolon kiel tiu de Molière en la XVII-a jarcento franca, aŭ tiu, kiun ĝi ludis en kelkaj mezeŭropaj lingvoj en la XIX-a jarc., t.e. unuecigilo, mortero inter homoj politike aŭ eĉ lingve disaj.

Sed kio estas „perfekta prononco"? Neeviteble restas nacilingvaj influoj. Kaj plie, kio estas „akcentoj"? Mi bonvolas nomi akcento tiun iom apartan koloron de vokalo, tiun detaleton en la maniero prononci tiun aŭ alian konsonanton, tiun iom tipan frazmelodion. Sed ĉu paroli pri „akcento" kiam anglo terure diftongas? Kiam franco akcentas la lastan aŭ nazaligas? Kiam germano konfuzas *d-t* aŭ *b-p*? Kiam japano konfuzas *l* kaj *r*? Tiukaze ne plu temas pri „akcento" sed pri misprononco. Tio ĉi estas nepre neakceptebla. Krome, eĉ supozante, ke aktoro sukcesas tute forigi sian nacian akcenton restas postulo pri artikulacio (aŭ dikcio) tio estas la maksimuma klareco en la elparolado senkonsidere



Sceno el „La Kalva Kantistino". Malantaŭ la gazeto s-ro G. Lagrange.

pri la nacia influo. Tion oni atingu per ekzercadoj kiel nacilingve. Ĝis nun oni povas nur celi tiun esperantiston pri kiu oni senrezone sentas ke li plej bone prononcas. Modelojn oni serĉu inter jugoslavoj aŭ poloj, kiuj nature kaj senpene bele parolas. Nenion pli oni povas aldoni.[5]

Sed estas alia multe pli grava punkto: la frazakcento. La frazakcento estas io tre subtila kaj tamen esenca en lingvo. Ĝi konsistas el komplika kontrapunkto de ĉiuj parametroj, kiuj konsistigas la parolon: alteco, longeco, laŭteco de vokaloj, silentoj kaj silenteroj inter vortoj, akcelado kaj malakcelado de la parolritmo k.t.p... Tio estas multe tro komplika por esti difinebla kaj tamen tio estas esenca por la interkompreniĝo. Nur dank'al tiu frazakcento oni povas interkompreniĝi en bruo aŭ en malbonaj akustikaj kondiĉoj: la vortojn oni ne plu kaptas sed la frazmelodio sufiĉas. Bedaŭrinde tiu frazakcento varias ne nur de unu lingvo al alia, sed de unu regiono al alia, de unu socia klaso al alia kaj eĉ de unu persono al alia. Ĝi kapablas per nur kelkaj vortoj malkaŝi la devenon de iu – se temas pri familiara lingvo – sed se ĝi estas iom fremda ĝi povas malhelpi la komprenon. Tio sur scenejo estas verŝajne la plej grava obstaklo. Cetere tiu frazakcento estas des pli grava ju pli sensignifa estas la frazo. Alivorte la graveco de la frazakcento estas inverse proporcia al la semantika enhavo de frazo. Ekzemple la tute banala frazo: „Kion vi diras? " povas enteni laŭ la tono (fakte la frazakcento) nuran demandon, miron, riproĉon, angoron, ironion, teruron ... Tie ĉi ni rekte eniras la ludadon de la aktoro. Kiel trovi regulojn en tio? Kompreneble la plej simpla kaj instinkta agmaniero de la teatroamatoro estas uzi la saman frazakcenton kiel en sia gepatra lingvo. Sed ĉu tio estas la bona solvo? Certe ne ĉiam. Okazas ekzemple, ke la francoj preskaŭ ĉiam levas la voĉon sur la frazfinoj dum la hungaroj (kaj ankaŭ iom la germanoj) lasas la voĉon fali. Kie la vero en tio? Ankaŭ en tio oni povas nur imiti la belparolantojn, ĉefe la polojn. Sed oni jam ekvidas unu punkton de mia konkludo: estus necesege krei internacian trupon en kiu kunfandiĝus la diversaj influoj por atingi homogenan parolmanieron ... Bela revo, ĉu ne?

Oni ne forgesu, ke ludante teatraĵojn en Esperanto, ludas homoj en lernita – ne gepatra – lingvo antaŭ homoj, kiuj plejofte aŭdas la lingvon nur kelkajn tagojn en la jaro aŭ nur duone regas ĝin. Ili jam streĉe aŭskultas por kompreni, eĉ se la aktoroj cetere perfekte prononcas. La rezulto estas, ke anstataŭ spritaĵon strangavortan ili komprenas banalaĵon, kiu fonetike similas.[6] Ĉu citi la kazon de tiu spektanto bonega esperantisto, kies ekridon pro bongusta spritaĵo bridis apudsidanto streĉita en komprenklopodo? Kaj dume sur la scenejo, la aktoroj demandas sin kial do tio ne „trafas"?

Estos du konkludoj al tiu rapida trarigardo pri teatra lingvo. La unuan, kiu koncernas la parolan surscenejan lingvon mi jam aludis: la fakto, ke la aktoroj laboros „inter si" t.e. inter samlingvanoj kulturas la mankojn. Tiu malfortaĵo estas ĝenerala en Esperanto, kiu bedaŭrinde ne sufiĉe ofte funkcias kiel efektiva internacia lingvo, sed tio estas ankoraŭ pli malbona koncerne la teatron. Por atingi vere internacian ludmanieron (almenaŭ interne de la eŭropa kulturo) oni devus organizi diversnacian trupon. Mi jam diris: bela revo. Sed kial ne?

Koncerne la verkadon mia konvinko restas, ke ne jam ekzistas en Esperanto dramoj kvalite kompareblaj kun tiuj de la grandaj kulturlingvoj, tial ke ne jam naskiĝis en Esperantio eminenta dramverkisto, kio estas statistike normala, konsiderante la junecon de la lingvo kaj la malmultnombrecon de la lingvanoj. Tial dum verŝajne ankoraŭ unu generacio oni klopodu traduki la ĉefverkojn de la mondliteraturo teatra; sed traduki en lingvo samtempe bela, fidela kaj teatra, t.e. retrovi kaj la spriton, kaj la lingvajn nivelojn de la originaloj kaj trovi formojn, kiuj trafas. Nur poste, kiam vere ekzistos vivanta teatra lingvo, naskiĝos originala esperanta teatro kun universala valoro ...

PIEDNOTOJ

[1] La distanco inter la parola kaj la skriba parto de lingvo povas esti treege granda. Ĝi klarigas ekz-e kial la romanidaj lingvoj tiel malsimilas al la klasika latina eĉ strukture: tiuj lingvoj ne venas de tiu klasika, sed de la ĉiutaga parolata surstrate, kiu preskaŭ ne plu uzis deklinacion. Hodiaŭ en la franca kelkaj vortoj kaj ĉefe konjugaciaj formoj estas nur skribaj kaj ridigus se oni uzus ilin parole. En Grekio, ĝis oni freŝdate oficialigis la „dimiotiki"-lingvon, estis laŭdire neeble verki verŝajnan dialogon, en la skriba lingvo, kiun neniu plu parolis.

[2] Tial la „poezio" de la pratempo Esperanta estis nur bonintenca prozodia ekzercado, sed neniel komparebla kun la verkoj post 1950. Tiel longe kiel oni miris, „ke oni tamen interkompreniĝas", oni ne povis arte ludi per vortoj kaj vortbildoj, kio estas fakte la poezio. Inverse poezio povas subite aperi meze de banala prozo, kiel velura levkojo sur grizaŝtona fabrikmuro, ĉar ĝi kuŝas en la vortoj kaj ties semantika enhavo, ne en la metriko, kiu estas nur teĥnika helpilo.

[3] *„Trafi"*; faka senco. Se efekto (precipe komika) planita ĉu de la aŭtoro, ĉu de la reĝisoro, ĉu de la aktoro atingas sian celon, t.e. ridigas la publikon, oni diras „tio trafas". Se „tio ne trafas" oni demandas sin, kiu kulpas kaj kial?

[4] William Auld „Kvazaŭ birdoj konstruas neston ..." en la unuaj versoj: Prokris: Kial, Rodopea, vi venas, Taŭzante la splenokvaston de miaj sopiroj?" Eldonis Stafeto. *„Unufingraj melodioj."* P. 81.

[5] Ankaŭ pri prononcado la lingvodiferencoj estu volaj. Ili indiku klasajn aŭ geografiajn diferencojn *volitajn* de la aŭtoro kaj ne nekapablon de la aktoro ĝuste elparoli. Ankaŭ tio estas solvota problemo! ...

[6] En „La Kalva Kantistino" de Ionesko, S-ino Smith diras: „Tio laksigas min" kaj tio ne trafas ĉar la publiko komprenas: „Tio lacigas min" Pli poste Sinjoro Marten diras: „Ŝi manĝas kokidaĵon en vespejo" kaj la publiko tre verŝajne komprenas: „... en vespero".

Jadwiga Gibczyńska

Estas artistoj por kiuj sufiĉas aperi sur la scenejo kaj ili tuj enŝteliĝas en la koron de la publiko. Tia aktorino estas nia unika solistino, Jadwiga Gibczyńska pri kies magneta efekto al sia publiko jam kelkfoje povis konvinkiĝi niaj teatro-amantoj.

Vere, ŝia aktorina kariero estas preskaŭ senekzempla en la historio de la E-teatro, eventuale estas komparebla nur kun tiuj de niaj plej elstaraj eminentuloj, malgraŭ tio, ke la esperantistaro sufiĉe malofte havas eblon ĝui ŝian eksterordinare perfektan arton.

Ŝi unu-dufoje jam partoprenis ekster oficialaj programoj de kongresoj, sed Budapeŝto estis la urbo, kie ŝi unue surprizis sian publikon per du tute malsamaj monologoj laŭ la plej alta arta nivelo. La unua monologo estis scenigita rakonto de A. de Saint-Exupéry, „La eta princo". *Tiu estis rakonto de unu heroo, sed en ĝin de tempo al tempo enplektiĝis la mirindege karakterizaj voĉoj de aliaj personoj. En la monologa dramo de Finn Methling,* „Vojaĝo al verdaj ombroj" *Jadwiga Gibczyńska prezentis sin de tute alia flanko. La dramo kondukas nin tra sorto de virino ekde la infanjaroj ĝis la morto en maljunaĝo. Ŝi kun natura ĉarmo personigis kaj la ludantan infanon kaj poste la amantan knabinon, ke baldaŭ kun plena travivado prezentu al ni la ĉagrenojn de virino kaj patrino kaj fine la vidviniĝintan maljunulinon, starantan jam ĉe la rando de sia tombo.*

Poste ni longe ne vidis nian ravan monologistinon sur nia scenejo, nur en 1975 ŝi omaĝis la memoron de la fama Nobel-premiita sciencistino Marie Curie, prezentinte sin de eĉ pli nova flanko. La monologo estis verko de J. Gibczyńska, kaj por kunmeti la teatraĵon ŝi faris konsiderindan esplorlaboron pri la vivo de la fama poldevena sciencistino, trastudinte diversajn tiutempajn memuarojn kaj la biografian romanon de Eva Curie.

La revuo „Esperanto" raportas pri la kontribuaĵoj de Jadwiga Gibczyńska al la programo de la kongreso en Kopenhago sub titolo „Triumfo de Jadwiga Gibczyńska". *Dum la Dana Vespero, okaze de centjara datreveno de la morto de Andersen, ŝi kun granda sukceso prezentis fragmenton el la verkaro de la granda dana fabelverkisto, la* „Galoŝoj de feliĉo".

Ŝia alia programo estis la antaŭ naŭ jaroj dum la Budapeŝta Kongreso prezentita „Vojaĝo al verdaj ombroj", *kie ĉeestis ankaŭ la verkisto, Finn Methling.*

La raportoj unuece rekonis, ke la „Vojaĝo al verdaj ombroj" estis la plej altnivela programpunkto de la Dana Vespero kaj nia eminenta aktorino brile pruvis, ke ŝi majstras sian arton.

Kaj la kritiko?

Jen: „Ŝi estas unu el la plej bonaj artistoj, kiuj dum la lastaj jardekoj aperis sur la scenejoj de la UK-oj. Kun enhavo konvena al la kongresa ĉeftemo, kun perfekta lingvaĵo kaj senmanka ritmo, tiu majeste nuancita monodramo estis prezentita perfekte".

Akiri tian kritikon en Esperantio ĝis nun sukcesis nur malmultaj. Kion do povas aldoni al la pli supraj konstatoj historiisto?

Eble tion, ke dum la Teatra Renkontiĝo en Gdansk nia rava aktorino denove pruvis la pravon de la citita kritiko per la prezentado de „Slavaj fabeloj" *de B. Leŝman?*

Ni deziras, ke Jadwiga Gibczyńska ankoraŭ dum multaj jaroj ĝojigu nin per sia perfekta arto . . . sed se eblas iom pli ofte.

Árpád Abonyi-Nagy

Kiril Drafev

Dum pluraj naciaj aŭ universalaj kongresoj de Esperanto delegitoj kaj gastoj ĝuis teatrajn prezentadojn de amatoraj trupoj. Iom post iom tiuj prezentadoj sin transformis al tradicio, al kiu la postuloj de la spektantoj kreskĉende kreskis. La publiko sopiris pri teatro, kiu povus amuzi, emocii kaj eduki en Esperanto same kiel ĉiu alia teatro, ludanta en nacia lingvo.

En 1956 min obsedis ideo pri teatro de profesiuloj. Mi konigis ĝin al nia veterano Atanas D. Atanasov-Ada, al Nikola Nikolov, membro de la Estraro de BEA, al Slavĉo Vasev, elstara bulgara ĵurnalisto kaj publicisto, al Mico Andonov, estinta ĝenerala sekretario de la Unuiĝo de Bulgaraj Aktoroj kaj al kelkaj profesiaj aktoroj. Konvinkitaj pri senduba sukceso, ili adoptis kuraĝige la allogan ideon. Skeptikis profesiuloj.

En 1957 la intereso pri Esperanto en Sofia estis kolosa. En la aŭtuno estis malfermitaj 42 kursoj. Post mia konsento, mia samurbano kaj aktoro Georgi Kerelezov organizis kurson por siaj kolegoj en la tiama teatro „Trudov front", kiun gvidis Miĥail Langov.

La sortoj de ĉiuj kursoj similas unu la alian; baldaŭ la entuziasmo sin transformas al apatio. Post ne pli ol 4 lecionoj la kurson minacis malfondo. Por savi ĝin, la iniciatinto, la kursgvidanto kaj la reĝisorino Stefka Prohaskova decidis organizi literaturan vesperon de varia programo. La Estraro de BEA, kies membro estis mi, komisiis al mi la taskon helpi la organizadon de la planita aranĝo kaj gvidi la ensemblon. Akceptinte, mi komencis gvidon, kiu daŭras jam du jardekojn.

La 19-an de Majo 1958, en la salono de la menciita teatro, antaŭ elita esperanta kaj neesperanta publiko de intelektuloj, per konvena parolado mi malfermis solene la unuan prezentadon de la elkovita teatro. La sekvintan tagon la gazetaro kronikis la eventon,

20 jaroj de Bulgara Esperanto Teatro

Dum la 63-a Universala Kongreso en Varna la Bulgara Esperanto-teatro festis sian 20-jaran jubileon. Laŭ peto de nia Redakcio, la ĉefa gvidanto de BET Kiril Draĵev, *fius distingita per ŝtata ordeno „Kiril kaj Metodi", afable donis al ni aŭtentikajn respondojn pri la longjara aktiva agado de la Teatro.*

„Literaturen Front", organo de la Unuiĝo de Bulgaraj Verkistoj, publikigis dukolumnan artikolon pri la naskiĝo de la revita teatro, nomita Bulgara Esperanto-Teatro, en sigla formo BET.

Por teatro, flamanta torĉo de internacia kulturo, la teritorio de unu sola lando estas nesufiĉa. Ĝi bezonis internacian scenejon kaj publikon. Baldaŭ prezentiĝis pluraj okazoj.

Dum la UK en Varsovio BET debutis per la bulgara komedio „Ĉasantoj de oficoj" de Ivan Vazov, reĝisorita de Stefka Prohaskova. Tondraj aplaŭdoj de pli ol 3000 spektantoj. La sukceso estis neatendite granda. Pola Radio surbendigis kaj post du semajnoj elsendis la komedion. En 1960 la sama komedio estis prezentita en Split dum la III-a Kultura Festivalo de la jugoslaviaj esperantistoj.

Dum la UK en Sofia BET reaperis kun la amuza „Komedio de eraroj" de Shakespeare en traduko de William Auld kaj Asen Simeonov. Reĝisoris St. Prohaskova. Proponante sian helpon al BET, s-ro Auld deklaris: „Labori por vivanta teatro estas vera plezuro".

Post neesperiga paŭzo nova febro. Dum la UK en Budapeŝto ses aktoroj prezentis kvar unuaktaĵojn. La publiko ridis, sed Michel Duc Goninaz titolis sian recenzon: „BET trompis esperojn". La recenzo kaŭzis al ni zorgojn pri la arta nivelo de BET. Laŭ plurfoja sugesto de niaj kulturaj instancoj, BET devis varbi novajn fortojn el la Ŝtata Akademia Teatro de Sofia. Kun vera entuziasmo kaj konscio pri sia respondeco antaŭ la ekstera mondo, al BET aliĝis disĉiploj de Melpomena, distingitaj per la plej altaj honoraj titoloj. La nova taĉmento sin prezentis en Vieno per la bulgara folklora komedio „Virina Regno" de St. L. Kostov. Reĝisoris Prof. Mois Benieŝ. Sekvis diverĝaj pritaksoj. Dume s-ro de Smèt en „Heroldo de Esperanto" konsideras la nivelon de BET „iom pli alta ol amatora", s-ino Emilija Lapenna skribis: „La gvidanto de la ensemblo, Kiril Draĵev, rikoltis sincerajn aplaŭdojn direktitajn al li kaj al la aktoroj, kiuj prezentis viglan, bone rolitan nenuntempan, sed plaĉan teatraĵon, kapablan kontentigi eĉ personojn, neinteresitajn pri teatra arto."

Nova streĉo de fortoj al plua sukceso. En Londono sur la scenejo furiozis „Mandragoro" de Nicolo Machiavelli, reĝisorita de prof. Kr. Mirski. Sur la paĝoj de „HdE" de Smet tamburis ke „ĝis hodiaŭ en universala kongreso spektaklo je tiom alta nivelo estis nevidita". Siaflanke Marjorie Boulton aldonas: „La fakto ke primitivisma humoro kaj burleska prezenta stilo ne plaĉas al mi, kredeble pliigis mian estimon al la trupo, kiu ridigis min kontraŭ mia volo. Estis vera plezuro vidi la profesiecon de BET".

Teo Jurukov (Arnolph) kaj Iskra Radeva (Ágnes) en „Lernejo de Virinoj" de Molière.



En Hamburgo BET prezentis la komedion „La Barbiro de Sevilla" de Beaumarchais, reĝisoritan de Pavel Pavlov. En dankletero de s-ro Bormann, Prezidanto de LKK, adresita al la gvidanto de la teatro, ni legas: „Sub via kompetenta gvido unuarangaj bulgaraj reprezentantoj de la bulgara sceneja arto manifestis sian individuan majstrecon. Post la Kongresoj en Vieno kaj Londono, nun en Hamburgo via trupo brile montris al la ekstera mondo la klasikan skolon de la bulgara teatro".

La flataj vortoj de s-ro Bormann, avide legitaj de niaj kulturaj kaj financaj instancoj, kaŭzis novan elanon. En Kopenhago BET denove vidigis sian arton per „Servisto de du mastroj" de Carlo Goldoni, sub reĝisorado de Miroslav Mindov. Sub titolo „Grandioza prezentado" Michel Duc Goninaz komplimentis: „Aktora ludo perfekta, prononcado senriproĉa. Nur laŭdojn oni povas adresi al Kiril Draĵev kaj al la aktoroj, kiuj brile plenumis sian taskon".

BET staris ĉe sia apogeo.

En la varmega Ateno nova sukceso. Sur la scenejo potence regis Molière per sia „Lernejo de virinoj", reĝisorita de Miroslav Mindov. En „Esperanto" Vilmos Benczik interalie skribis: „La prezentado estis de profesia nivelo. Por mi, kiu unuan fojon aŭdis kaj vidis la trupon, estis aparta plezuro la bona prononcado de la aktoroj. Ili parolis fluan, klaran Esperanton kaj dank' al la lerta traduko de Kiril Draĵev, la spektantoj tute ne rompis al si la kapon por ion kompreni, krom tiuj, kiuj sidis malantaŭe kaj suferis malbonan akustikon".

En dankletero la Prezidanto de LKK Georg Miggas emfazas la senĉesan altigon de la nivelo de BET.

Pri la rozario de sukcesoj de BET, Michel Duc Goninaz publikigis longan

(daŭrigo de paĝo 9)

artikolon en la bulgarlingva revuo „Teatar", organo de Unuiĝo de la bulgaraj aktoroj.

La lasta prezentado de BET okazis dum la UK en Varno. La komedion „La Megero" aplaudis 4500 spektantoj el pli ol 50 landoj. Post la Kongreso BET prezentis la saman komedion en Leningrad. En USSR, kie Esperanto staras antaŭ oficiala agnosko, la akcepto de la komedio estis pli ol entuziasma. La loka ĵurnalo „Smena", organo de la Komsomolo, publikigis intervjuon ricevitan de la gvidanto de BET.

Aperis recenzoj ankaŭ pri „La Megero". En „HdE" kaj „Esperanto" la recenzantoj Em. Lapenna kaj P. Rados analizas la dramon, laŭdas la ludon de la aktoroj, kritikas la reĝisoron Ivan Dobĉev kaj plendas pro la vastega halo, nekonvena por teatra prezentado.

Ne ekzistas pli malsimpla arto ol la teatra. Ĝi estas afero kolektiva, en kiu gilose sin interplektas literaturo, aktora interpretado, reĝisora gvido, muziko, dancoj, scenografio, lumoj k.a. Ĉefa elemento tamen restas la literatura verko – la dramo – kiu determinas la karakteron de la teatro. Ofte ni aŭdas etajn riproĉojn pri netrafa repertuaro. Estas malfacile elekti repertuaron laŭ gusto de plurnacia publiko. Por savi nin el repertuara embaraso mi tradukis 16 tragediojn kaj komediojn. Startante de la laciĝo de la kongresanoj pro ĉiuvesperaj aranĝoj, BET preferas la komedion. Nur ĝi povas ekde la komenco kapti la atenton de la laca publiko kaj teni ĝin vigla ĝisfine. Konsiderante la nekontentigan lingvan nivelon de parto de kongresanoj, BET elektas pli aŭ malpli konatajn klasikajn verkojn, kies enhavo estas facile komprenebla. Kaj BET sukcesis. La flataj recenzoj kaj la alfluo de centoj da laŭdaj postspektaklaj leteroj al la aktoroj pruvas tion.

De jaro al jaro, de lando al lando, en luksaj teatraj salonoj de la kongresurboj, pruvante la scenejan uzeblon de la internacia lingvo, per altnivelaj enscenigoj, BET altiris milojn da okuloj al sia lando kaj varbis nemodestan nombron de amikoj kaj simpatiantoj por ĝi. Per sia arto, manifestata al la imponaj forumoj – la Universalaj Kongresoj – per emociiga efiko kaj spirita plezurigo, BET montras al la ekstera mondo parton de la multflanka kulturo de sia socialisma lando. Ĝia agado estas aprezata kiel grava kontribuo al la internacia kunlaboro sur la kampo de la monda kulturo. Tiu nobla celo kaj vigla agado pravigas ĝian kreon, ĝian ekziston kaj ĝian apogon.

Esti utila

Intervjuo kun geaktoroj de Pola Esperanto Teatro

Zbigniew Dobrzyński kaj lia parulino Kalina Pieńkiewicz en 1971 fondis la Polan Esperanto-Teatron „A. Grabowski" (PET) kaj ekde tiam ili aktoras nur en Esperanto. Post okmonata Usona turneo en 1973, kie ili faris sukcesajn prezentadojn en pluraj urboj, veturante pli ol sep mil mejlojn, en 1974 ili debutis ankaŭ en UK en Hamburgo, kaj en la lastaj jaroj vizitis aron da Eŭropaj landoj de Aŭstrio ĝis Svedio.

De Tero Dobĵina ĝis Esperantujo

Tero Dobĵina prikantita de Mickiewicz en la epopeo Sinjoro Tadeo donis multajn oferemajn kaj agemajn patriotojn al Pollando, mem la aŭturo de la verko estis unu el ili. Pollando donis al la homaro krom kreinto de Esperanto multajn eminentulojn ankaŭ al nia movado kaj kulturo en la pasinto, kaj polaj esperantistoj ankaŭ nun efike kontribuas al la disvastigo de la lingvo internacia.

Inter la konataj nuntempaj aktivuloj de Esperanto en Pollando – interesa hazardo – pluraj havas la nomon Dobrzyński. El tiuj „Dobĵinanoj" sendube la plej konata estas la geaktora duopo Dobrzyński-Pieńkiewicz. Ili multfoje spektaklis ankaŭ en Hungario, ankau ĉi tiu konversacio okazis en Budapeŝto, dum la 27a Hungarlanda Esperanto Kongreso, kies kulturan programon kontribuis ankaŭ PET kun teatraĵo de A. Wojdziński.

Demando: *Post nacilingvaj teatraj sukcesoj rekonitaj de la polaj publiko kaj ŝtato, kiuj motivoj instigis vin ŝanĝi teatron de gepatra lingvo je internacilingva, la konstantan, fiksan kaj komfortan postenon je necerta kaj malpli komforta? Kiel tio komenciĝis: ĉu vi estis esperantistoj jam antaŭ la profesi-elekto, aŭ la geaktoroj fariĝis esperantistoj?*

Respondo: Kiam ni esperantistiĝis jam ambaŭ finis la Akademion pri Teatro- kaj Filmarto en Lodzo, kaj ni ekvidis la eblojn kaŝitajn en Esperanto, nome ke ĝi efike povus helpi la proksimigon de diversaj kulturoj. La homa kulturo estas universala, tamen dramaj aktoroj malofte kaj nur esceptokaze povas akiri sukcesojn en fremda lingvo, antaŭ alilingva publiko. Estas verkistoj dulingvaj, kiuj konkeris legantaron eĉ per siaj aĵoj verkitaj en la dua lingvo, sed multaj estas la aktoroj elmigrintaj, kiuj eĉ post dudek jaroj pasigitaj eksterlande repatriiĝas – por kaj pro la gepatralingva publiko. Esperanto kiel internacia idiomo, kiu egale estas ĉies propraĵo, povas fariĝi peranto de kulturo inter diversaj nacioj. Tiu kompreno instigis nin por lerni Esperanton, por intense ĝin studi, por akcepti la riskon. Multe da laboro, da energio kuŝas en niaj prezentadoj. Preparante nin por spektakloj ni tralaboras plurajn tagojn kaj noktojn . . . sed ni devas pruvi nian konvinkiĝon: Esperanto estas taŭga internacia lingvo en ĉiu vivtereno, ankaŭ en la kultura sfero.

Demando: *Nia ĝisnuna Esperantlingva konversacio forigis mian pli fruan, anticipan supozon – pro kiu mi petas pardonon – ke viaj surscenejaj sukcesoj estas akiritaj per kosto de longedaŭra diligenta lernado por parkerigi la Esperantlingvan tekston. Ĉar tre agrable min surprizis, ke vi ambaŭ bonege parolas Esperante. Kie kaj de kiu vi lernis la lingvon?*

Respondo: Vi tamen pravas koncerne la longedaŭran diligentan laboron, eĉ oni povas paroli pri ŝvita, laciga sinpreparo, sed ni neniam koncentris nian atenton sole al la prezentadoj. Ni ambaŭ lernis la lingvon aŭtodidakte, sen kurso, sed feliĉe, tiutempe ni loĝis jam en Varsovio kaj havis la eblon iam ajn kontaktiĝi pertelefone aŭ persone kun Andrzej Pettyn aŭ kun aliaj bonaj esperantistoj kiuj multe helpis nin. Ni strebis por alproprigi la spiriton de la idiomo, kaj estas nature, se ni uzas Esperanton en ĉiu vivtereno. Kion alion fari? Ĉu ni lernu ĉiam la lingvon de la lando kie ni havas spektaklon, ĉu ni lernu dekojn da lingvoj?

Ambasadoroj de Pollando kaj Esperanto

Demando: *Unu el viaj recenzantoj prezentis vin kiel ambasadorojn de Pollando kaj de Esperanto, kaj fakte, via ĝisnuna agado konvenas al ambaŭ epitetoj: „Pola" kaj „Esperanta", ĉar vi prezentis nur teatraĵojn de polaj dramverkistoj. Ĉu vi ne planis prezenti ankaŭ originale verkitajn teatraĵojn, ekzemple tiun de Baghy: „Granda Ludo", kiu konvenus al la konsisto de via teatro?*

Respondo: En nia ĝisnuna repertuaro fakte troviĝas verkoj tradukitaj el la pola lingvo, unu el niaj celoj ja estis prezenti nian nacian literaturon al internacia publiko. Kaj ĉe la elekto ni devis konsideri verkojn, kiujn nia dupersona teatro povas prezenti sen laŭsenca ŝanĝo. Tamen ni jam planis plivastigi nian repertuaron per teatraĵoj originale verkitaj (verkotaj) en Esperanto. Antaŭ nelonge ni ricevis la libron „Ora Duopo", kiu enhavas la menciitan teatraĵon de Baghy. Ni studis ĝin kaj eble iam ni ankaŭ surscenigos ĝin.

Kalina Pieńkiewicz kaj Zbigniew Dobrzynski en scenoj de "Hipnoto„.

Krome ni anoncis ankaŭ konkurson por verkemuloj kaj ni esperas, ke rezulte ĉiu gajnos: la verkistoj, la geaktoroj kaj ne lastvice la publiko.

– Verkemuloj atentu! Ĉiujare en decembro la konkursa ĵurio atribuos premiojn inter kiuj la ĉefa estas 10-taga estado en Pollando laŭ invito de PET. Oni akceptas teatraĵ-tekstojn originale verkitajn en Esperanto por du geaktoroj. La tekstojn en tri ekzempleroj sendu al Pola Esperanto-Teatro ul. Walecznych 29/5 PL–03–916 Warszawa, Pollando.

PET estas do ne nur peranto, sed ankaŭ instiganto, mecenato de la Esperanta kulturo.

Agoj kaj reagoj

Demando: *Ĉu vi estas kontentaj pri via agado, pri la cirkonstancoj, pri la akcepto de viaj prezentadoj, pri la reeĥo, kritikoj, recenzoj ktp.?*

Respondo: Satiĝinta homo ĝenerale ne havas multe da aspiroj. Feliĉe, nin ankoraŭ ne trafis plena kontentiĝo. La cirkonstancoj diferencas disde tiuj de nacilingvaj teatroj, ĉi-terene niaj ebloj estas pli modestaj, sed ni ne volas plendi, ja tion ni enkalkulis. La kontentiĝo ankaŭ ĉi tie dependas de la publiko, kaj la celo estas reciproka kontentigo. Kiam ni decidis dediĉi nin al la Esperanta publiko, ni havis konvinkiĝon, ke tio estas nepre bezonata. Tiun nian supozon pravigis ankaŭ opinio de H. Tonkin, prezidanto de UEA, kiu post nia prezentado en Münster diris: „Fine ni havas veran profesian teatron, kiu ĝis nun mankis en Esperantujo."

Tiu ĉi rimarko plu kuraĝigis nin, plifortigis nian konvinkiĝon pri la reciproka bezono: Esperantujo bezonas konstantan profesian teatron internacilingvan, kaj tia teatro ne povas vivi sen publiko esperantista.

Ekzistas ankoraŭ mankoj: foje la nekontentiga organizado, foje la laŭhazarda konsisto de nia spektantaro . . . En Esperantujo multaj nur ludas per Esperanto, ilia pasiveco, indiferento ĝenas, foje-foje rekte malhelpas min.

Koncerne la gazetaran, kritikan reeĥon ni ne estas kontentaj. Aperas laŭdaj, sed nenidiraj recenzoj, alia recenzanto esprimas sian subjektivan malplaĉon sen ekspliki ĝian kialon. Kvankam ni bezonegas la valoran kritikon. Pli ol 500 fojojn ekzemple ni prezentis la teatraĵon „Proksima nekonato", sed eĉ post la kvincenta prezentado ni ne ricevis utiligeblajn kaj konsiderindajn rimarkojn, kiuj helpus nian agadon, nian pliperfektiĝon.

Demando: *Kiel vi povus resumi rezultojn de la agado de PET?*

Respondo: Eble ni jam sukcesis prezenti ion el la pola dramliteraturo, el tendencoj de la pola dramaturgio, sed ni opinias en nia agado plej grava, ke eble ĝi sukcesis plialtigi la nivelon de kulturaj bezonoj de la esperantistaro, ni kontribuis transformi ĝian pensmanieron. Forpasis ja la tempo kiam oni aklame akceptis sur la scenejo entuziasmajn diletantojn, kiuj faras prezentadon en perfekta Esperanto, aŭ profesiulojn de iu nacia teatro, al kiuj estas pardoneblaj la lingvaj eraroj, malĝustaj akcento kaj prononcado.

Malgraŭ multaj mankoj, ekzistantaj ankoraŭ kompare al la nacilingvaj teatroj, ni sentas: nia propra afero laŭiras la vojon komencitan, prezentas al la esperantista mondo altnivelan teatran arton, kaj dokumentas al neesperantistoj, ke la internacia lingvo Esperanto altnivele povas plenumi tiun taskon. Ni laboros plu, ja por tio ni vivas: fari ion bonan, esti utila . . .

Dankante la intervjuon, multe da sukceso deziras al vi:

Márton *Fejes*

LEHEL

KOMPRESORA HEJMA FRIDUJO

HB 240 ***



HÜTŐGÉPGYÁR

Jászberény

Revuo de Esperantaj teatroj

Kiel nia revuo mallonge jam informis pri tio, fine de majo dum kelkaj tagoj la pola urbo Gdansk fariĝis centro de la Esperanta kulturo: enkadre de la l-a Internacia Teatra Renkontiĝo en tiu ĉi urbo havis rendevuon kulturantoj kaj adeptoj de la internacilingva teatra arto.

La iniciato de la polaj esperantistoj estis utilega, ja la unuan fojon dum la historio de nia kulturo eblis havi superrigardon pri nia preskaŭ tuta teatra arto en nur kelkaj tagoj kaj en la sama loko.

La spektantoj povis vidi ses prezentaĵojn, en la plenumo de kvar trupoj kaj la solistino Jadwiga *Gibczyńska.* (Geaktoroj el Sofio kaj Leningrado ne povis alveni al Gdansk, kaj tio nepre malpliigis la kompletecon de la Renkontiĝo, kiel ankaŭ la foresto de BET.)

TESPA – Teatro Esperantista de Parizo – prezentis la verkon *La kalva kantistino* de *Jonesko.* La ludo de la franca trupo estis nepre impresa, la subskribinton ravis ĉefe ĝiaj natura mov-kulturo kaj profunda kompreno de ĉiuj nuancoj de la ludata teatraĵo. Nepra manko estis la ĝene neĝusta prononcado de kelkaj aktoroj: foje temis eĉ ne pri nacieca misprononco de Esperanto, sed simple pri nekorekta artikulado de iuj sonoj. Apartan laŭdon meritas la trafa elekto de la verko: la problemo de komunikiĝo en esperantista medio ĉiam povas kalkuli pri interesiĝo.

La finna trupo – havanta la ambician nomon „Esperanto-Teatro de Finnlando" – prezentis du spektaklojn: farson de M. *Boulton (La unua helpo),* kaj sub la titolo *Patrino de Lemminkainen* fragmenton el *Kalevala.* Sendube tiu trupo efikis iom senrevige pro sia ne-prilaborita, iasence kruda ludo kaj fuŝa prononco. En la ludo de la aktoroj fakte ĉiu movo efikis nekonvinke, false. *Mi ne scias,* ĉu tiuj gejunuloj estas talentaj aŭ ne, ja ili ne donis eblon prijuĝi tion. *Sed mi certas,* ke ili apenaŭ faris provojn antaŭ la spektaklo, kaj ke ili ŝparis al si la penon lerni la diferencon inter la sonoj s-ŝ-c-ĉ-ĝ. Laŭdeton meritas nur la lerta enscenigo de la Kalevala-fragmento.

Pri la Pola Esperanto-Teatro ne necesas paroli aparte. Ili prezentis en Gdansk *La hipnoton,* kaj la spektaklo estis brila. PET estis elstare la plej bona trupo de la renkontiĝo: oni havis la impreson, kvazaŭ la futbalteamo de Real Madrid partoprenus interlernejan ĉampionadon.

Saŝa Sirovec kun siaj „gepatroj" en „La nevidebla Leonardo".

La samon mi povas diri ankaŭ pri Jadwiga Gibczyńska. Ŝi prezentis la verkon *Slavaj fabeloj* de B. *Lesman,* kaj ŝia ludo estis animkirle profunda. Gibczyńska estas vera *aktorino,* kiu kapablas mirinde *ludi,* kaj sola povas „plenigi" scenejon. (Eble pro tio ŝi iom – miaopinie – malsukcesis en Varno dum la UK. Tie ŝi *ludis* poemojn, kaj ne ĉiuj poemoj toleras tion.)

La Studenta Esperanto-Teatro el Zagrebo prezentis teatraĵon iom senpretendan, tamen ĉarman, sub la titolo *La nevidebla Leonardo.* Fakte ĝi estas akceptebla nur kiel porinfana verko. Tamen, la elekto ne estis malĝusta, ĉar ĝi montriĝis tasko plene solvebla per la kapabloj de la trupo. La nivelo de la aktora ludo estis iom heterogena: el la tuta trupo ture elstaris la 16-jara Saŝa *Sirovec* en la rolo de Maja. Oni demandas sin, ĉu en tiu trupo ŝi havos eblon evolui, aŭ eble ni ne plu aŭdos pri ŝi? Ŝia malapero estus senduba perdo por ni. Ŝia senceremonia, natura sursceneja movado, ĉarma figuro, agrabla voĉo, senmanka artikulado kaj modela Esperanta prononco estis por mi la plej agrabla surprizo en Gdansk.

Sed mi havis ankau surprizojn malagrablajn. Tiujn liveris al mi ĉefe la seminario post la spektakloj. Apenaŭ mi volis kredi al miaj oreloj, kiam pluraj aktoroj – kaj ankaŭ spektantoj – indigne reĵetis riproĉojn koncerne la neperfektan Esperantan prononcadon. Kelkaj eĉ formulis la tezon: „Gravas nur, ke oni komprenu nin, liberiĝi disde nacilingvaj prononckutimoj estas *neeble.*"

Stranga sinteno, ĉu ne, 91 jarojn post la naskiĝo de Esperanto? Aŭ temas ne nur pri Esperanta fenomeno, ja ni vivas en la epoko de lingva (kaj prononca) primitivismo? Ĉiukaze, la la rezignacia vorto *neeble* nuntempe ŝajnas populariĝi.

Mi komprenas bone, ke la fonetika instruado en la Esperanto-kursoj estas mizera, ja la lernanto preferas tuj lerni vortojn kaj regulojn, anstataŭ perdi tempon dum kelkaj semajnoj per fonetika ekzercado. Tamen, personoj, kiuj ambicias aperi sceneje, devas do postkurse ellerni regulan prononcadon.

La organizado – loĝejoj, manĝoj kaj programoj – estis perfektaj. Varman laŭdon meritas pro tio la du praktikaj organizantinoj – Jadwiga Greger kaj Ewa Kuligowska, kiuj montriĝis ĉiam ĝentilaj kaj helpemaj. Ili nur forgesis pri sola afero: inviti al la aranĝo iun esperantistan profesoron *Higgins.*

Vilmos *Benczik*

UNIKA FENOMENO

Pri Esperanta pupteatro

La pupteatro antaŭ jarcentoj estis unu el la plej ŝatataj amuzoj de la vastaj popolaj tavoloj. Ĝi disdonadis gajan humoron, plenan de originala popola saĝo, senindulgajn satirojn kaj ardan sopiron pri justeco.

Rolo kaj signifo

La teatro de pupoj, kiu hodiaŭ estas plejparte teatro por infanoj, servas la homon ekde la infanaĝo. Ĝi instruas al la puraj teneraj animoj pri la estetika ĝuo, kaj estas grava suplemento al la historia, literatura, muzika kaj belarta edukadoj de la infanoj.

Sufiĉas nur foje pli atente observi la infanpublikon, por kompreni la grandegan rolon de pupteatro en la vivo de infanoj.

Oni estingas la lampojn. La zumado ĉesas kaj la tuta halo dronas en profunda silento. Kelkcent soifaj rigardoj fiksiĝas al la scenejo. Kelkcent infanoj sorĉitaj enpaŝas en la mirindan mondon de la pupoj. Koloraj lumoj, buntaj dekorajoj . . . La pupoj kantas, ridas, ploras, faras miraklojn. Ankaŭ la infanoj ridas, ploras kune kun ili, nescie ke ili estas „nur" en la regno de arto, kiu per siaj rimedoj malkovras al ili la vastan mondon de la realo.

Malgraŭ ke la pupteatro nun estas destinita plejparte por la infanoj, oni ne forgesu, ke neniu matura homo bedaŭras, se li akompanis sian idon en la mondon de la pupoj.

Parolante pri la rolo de la pupteatro, antaŭ ĉio ni devas emfazi la rolon de la reĝisoro, belartisto, koreografo, komponisto, skulptisto, aktoroj kaj ĉiuj aliaj, ĉar en tiu sinteza teatro same gravan rolon ludas ankaŭ spacoj, lumoj, dekorajoj, muziko . . .

Celoj kaj perspektivoj de Esperanta pupteatro

La Internacia Lingvo por siaj adeptoj estas grava elemento en ilia internacia interŝanĝo de kulturvaloroj. Esperanto malkovras antaŭ iliaj okuloj la riĉajn kulturajn trezorejojn de aliaj popoloj. Sed ekzistas ankaŭ Esperanto-kulturo. Esperanto havas sian originalan literaturon, originalajn aŭtorojn kaj talentajn artistojn. Ĉiujare kreskas la nivelo de Esperanto-koncertoj kaj -teatroj. Ni estas la vivaj atestantoj de la malrapida, sed konstanta progreso de la Esperanto-kulturo.

Signifoplena estas la rolo de la teatro en ĉiu nacia kulturo, sed por Esperanto tiu rolo estas aparte grava, ĉar la teatro ne nur vivigas kaj riĉigas la lingvon, sed kontrolas kaj establas ĝin. El la scenejo devas soni la plej modela lingvo. Sur la scenejo la lingvo ricevas sian pulson, kaj de tie rekte, klare proklamas pensojn, ideojn kaj vekas emociojn.

La parolantoj de la Internacia Lingvo vivas dise en la mondo. Por la nuna etapo de la evoluo de Esperanto ankoraŭ ne ekzistas vasta reto de radiaj kaj televidaj dissendoj, kies destino estas ankaŭ normigi la lingvon. Tiun destinon nun transprenas la formoj de kulturaj aplikoj de Esperanto.

Aparte grava por tiu ĉi celo estas la rolo de Esperanta pupteatro. Por la infanoj, kiuj lernas la Internacian Lingvon en la infanĝardenoj, lernejoj aŭ hejme en Esperanto-familioj, la pupteatro pruvas, ke la lingvo kiun ili parolas vere ekzistas kaj donas al ili agrablan amuzon. Mi diras amuzon, ĉar la esperantistaj infanoj ne eniras la pupteatron kun la penso lerni kaj praktiki la lingvon. La Esperanta pupteatro unue ludas la saman rolon, kiel la nacia pupteatro: amuzi kaj delikate eduki, kaj due – establi, normigi kaj evoluigi la lingvan nivelon de la plej malgrandaj esperantistoj.

La Esperanta pupteatro tamen diferencas disde la nacia ankaŭ per sia internacia karaktero. La nacia pupteatro per siaj literaturaj-teatraj formoj, muzikaj fabeloj kaj diversaj scenludoj komunikas nur al la publiko de unu aŭ maksimume kelkaj landoj. La Esperanta pupteatro havas internacian publikon, kiun ĝi influas per sia arto senpere.

La Esperanta pupteatro pli racie vastigas ankaŭ la kulturan horizonton de la etaj spektantoj. Prezentante fabelojn de aliaj nacioj kaj popoloj, ĝi donas al ili perlojn el nekonataj kulturaj trezorejoj.

Sed krom tradukitaj naciaj fabeloj kaj dramverkoj, ĉiu pupteatro en la Internacia Lingvo devas havi veran internacian repertuaron. Unu el la taskoj de la Esperanta pupteatro por la estonto

estas krei originalajn scenverkojn, kaj tiel ĝi pli efektive partoprenos en la formiĝo kaj establo de la internacia kulturo.

La Esperanta pupteatro donas grandajn eblojn ankaŭ al siaj kreantoj. Reĝisoroj, belartistoj, pupaktoroj per Esperanto riĉigas sian propran kulturon. La Esperanta pupteatro donas al ili la noblan eblon komunikiĝi kun internacia publiko.

La pupteatraj ensembloj dum internaciaj festivaloj kaj rekontiĝoj konatiĝas kun la kreado de siaj kolegoj el multaj landoj, interŝanĝas spertojn kaj kontrolas la nivelon de siaj rezultoj en la arto. Ekzemple, dum la Kvara Pupteatra Internacia Festivalo en urbo Zagreb, Jugoslavio (1971), la partoprenantoj en la simpozio pri problemoj de pupteatra arto, pridiskutis la demandon pri la krea apliko de modernaj teknikaj rimedoj en pupprezentaĵoj.

Tiel la festivaloj de Esperantaj pupteatroj estas ankaŭ internaciaj altnivelaj profesiaj aranĝoj, dum kiuj la ensembloj povas prezenti novajn eksperimentojn en la pupteatra arto.

Amikaj profesiaj konversacioj inter reĝisoroj, aktoroj, belartistoj el diversaj landoj, estas pli oftaj kaj pli fruktodonaj, ĉar la Internacia Lingvo donas tiun eblon.

La Esperanta pupteatro havas ankoraŭ alian interesan flankon. En tiu teatro la infanoj devas esti ne nur pasivaj partoprenantoj, sed ankaŭ kreantoj. En la infanĝardenoj, lernejoj aŭ kursoj, kie la infanoj lernas Esperanton, oni povas organizi malgrandajn pupteatrajn prezentadojn, en kiuj aktoras la infanoj. Tiamaniere ili ne nur aŭskultos kaj rigardos, sed parolos kaj ludos. Similaj pupteatraj ludoj en Esperanto ne nur forte influas la parolatan lingvon, sed formas en la infanaj animoj la senton de kreado, estos kiel fruktodona ton de kreado, estos kiel fruktodona ora pluvo por la infana imago kaj vigla, sciema penso infana. Dum tiuj naivaj ludoj naskiĝas ankaŭ la noblaj revoj, kiuj poste senĉese gvidos la infanojn en ilia vivo. En tiu amatora infana pupteatro la unuan fojon la infanoj ekkonas la specifon de la arto, kaj ili ne nur bone komprenas kaj sentas ĝin, sed ankaŭ ekestimas kaj kritike taksas la laboron de la artistoj.

Humanismo – estas unu el la fundamentaj celoj kaj de la Internacia Lingvo, kaj de la pupteatro. Tiu ĉi komuna celo nature unuigas Esperanton kun la pupteatro.

Progresado
de la Esperanta pupteatra arto

La Esperanta pupteatro estas unika fenomeno sur la fono de la Esperanta kulturo.

Antaŭ dek jaroj, julie de 1968, en Zagreb okazis la Unua Pupteatra Internacia Festivalo (PIF). Ĝin partoprenis kvin pupensembloj: Hungara Ŝtata Pupteatro kaj la Pupteatro Regőczi–Szabó el Budapeŝto, Rumana Ŝtata Pupteatro de Cluj, Centra Pupteatro de Sofio kaj Zagreba Pupteatro. Ili prezentis en Esperanto ses scenludojn. Tiu evento elvokis grandan interesiĝon ĉe la gazetaro, radio kaj televido. La festivalon ĉeestis ĉ. 700-kapa publiko, sed pere de la televidaj elsendoj versajne pluraj dekmiloj vidis la prezentadojn.

La unua granda sukceso de tiu ĉi festivalo pruvis ĝian neceson kaj vivkapablon. Ĉijare PIF festas sian dekjaran jubileon. La ciferoj montras, ke dum la pasintaj naŭ jaroj en la Pupteatraj Internaciaj Festivaloj partoprenis 67 pupteatroj el 14 landoj de preskaŭ ĉiuj kontinentoj, kaj ili donis 577 prezentadojn.

La sukceso de la festivaloj kuraĝigis la organizadon de turneoj de unuopaj pupteatraj ensembloj en aliaj landoj. Ekzemple, la Zagreba Pupteatro gastis en majo 1970 en Danlando kaj donis tie kvar teatrajn prezentadojn, la Pupteatro de Cluj kaj la Pupteatro de Ploesti (Rumanio) gastis en Jugoslavio



Roberto Bánky, hungara pupaktoro

septembre de 1971 kaj aprile de 1972 kun entute 20 teatraj prezentadoj. La Pupteatro de Košice (Ĉeĥoslovakio) gastis en novembro de 1971 en Danlando, kaj ludis tie ok fojojn.[1]

Neforgesebla restos la pupteatra prezentado de hungara pupaktoro Roberto Bánky dum la 60-a Universala Kongreso de Esperanto en Kopenhago. Lia solista programo „Pupcirko" estis vera ĝuo por infanoj kaj plenkreskuloj. Tiu talenta pupaktoro plene dediĉis sin al la Esperanta pupteatro.

Dum tiu ĉi jaro, dum la 63-a UK la Ŝtata Pupteatro en Varna surprizis la publikon per sia modela spektaklo „La Dormanta Belulino", fabelo de Charles Perrot. En tiu ĉi pupteatra prezento ĉio estis perfekta. Preciza traduko fare de Kiril Draĵev, inspirita kaj talenta reĝisora laboro de Zlati Zlatev, atente elektitaj lumoj kaj koloroj, originalaj dekoraĵoj kiuj nur kiel fono aludas pri la atmosfero de la agado, ĉarmaj pupoj . . . Impresis ankaŭ la talenta ludo de la aktoroj, kies Esperanta prononco estis senriproĉa, eĉ modela. La kongresanoj longe memoros tiun belan spektaklon.

Ne necesas multaj ekzemploj por pruvi la ekziston de la Esperanta pupteatra arto. Tiu ĉi teatro ne nur formale ekzistas – ĝi vivas! Ĝi vivas en la koro de tiuj, kiuj kreas ĝin, ĝi vivas en la pensoj kaj rememoroj de tiuj, kiuj havis la eblon almenaŭ foje vidi ĝin. Ĝi vivas en la sopiroj de la plej maljunaj esperantistoj, kiuj deziras ĝin renkonti. Ĝi vivas kun la Internacia Lingvo Esperanto.

Georgi *Mihalkov*

[1] Laŭ la libroj „Esperanto en Perspektivo" kaj „10 jaroj de PIF".

Sceno el la „Ora birdeto". Ĉe la titolo staras rolantoj de „La Dormanta Belulino." Ambaŭ estis prezentitaj en Varna.





ĉapitroj el la historio

Zoltán Halász

6. Formado de la feŭda stato
Batalo kontraŭ la turkoj

Portreto de Luksemburga Sigmundo (1387 - 1437)

Sigmundo Luksemburg (1387–1437) okupis la tronon post longaj, sangaj bataloj inter la diversaj bandoj, kreitaj de la grandsinjoroj. La potencon havis reĝino Elizabeta, vidvino de Ludoviko la 1-a, anstataŭ sia filino Maria, deklarita heredantino de la trono. Elizabeta ordonis mortigi la pretendanton de la trono, Anjou-an Karlon, kies fideluloj samtempe mortigis Elizabetan. Finfine Maria akiris por si la tronon kiel edzino de Luksemburg Sigmundo, kiu sola havis ĉiujn reĝajn rajtojn, kvankam oficiale li estis konsiderata nur „kunreganto".

Dume ke la internaj bataloj dissplitigis la fortojn de la lando, la ĉiam pli kaj pli vasta turka imperio minacis jam senpere la sudajn landlimojn. El hungaraj, francaj, germanaj kaj italaj kavalerioj Sigmundo organizis armeon kaj ekatakis la turkojn por malhelpi ilian antaŭenmarŝon, sed en 1396 li suferis teruran malvenkon ĉe Nikapolo. Tial li elektis la sindefendon kontraŭ la turkoj, kaj laŭlonge de la sudaj landlimoj li konstruigis fortikaĵojn. La aluditan malvenkon sekvis novaj internaj koliziadoj; tial Sigmundo, kun la deziro gardi por si la tronon, konsideris necese federiĝi kun la plej potenca grupo de la baronoj, la ligo Garai-Cillei.

Sigmundo havis diversajn politikajn celojn, en kies realigo Hungario ricevis nur duavican rolon. Post kiam, en 1410, li estis elektita germana-romia reĝo, ĉiujn siajn fortojn li koncentris al tio, ke li akiru la titolon de imperiestro, kio finfine realiĝis en la jaro 1433. Kiel reĝo de Bohemio li ekbatalis kontraŭ

***Filippo Scolari, nomita Pipo de Ozora, kiu** en servado de Sigmundo direktis la defendon de la sudaj landlimoj (Samepoka murpentraĵo en Florenco)*

*Hungaraj kampuloj alportas donacojn al la reĝo (Kroniko de **la Konstanca Sinodo, de Ulrik Richental – Viena manuskripto)***

*Selo kun gravuraĵoj en osto – ĝi apartenis **al reĝo Sigmundo***



de la hungara popolo



La rekonstruita palaco de Ŝiklós. En la esplanado, la pordego de la siatempa palaco

La blazono de la Universitato de Óbuda, fondita de Sigmundo

la disvastigo de la Husaj doktrinoj. Samtempe li lasis perdiĝi la dalmatajn urbojn, kiuj iris sub la potencon de Venecio. Hungario, rezulte de la Sigmunda ekstera politiko, fariĝis ĉiam pli kaj pli entirita en la politikajn batalojn okazantajn en la centro de Eŭropo.

Grandan parton de la havaĵoj de Hungario Sigmundo uzis por siaj eksterlandaj celadoj. Kiel garantiaĵon li donis al la feŭdaj sinjoroj grandan parton de la reĝaj bienegoj: tiel meze de la 15-a jarcento, pli ol duono de la nacia teritorio estis jam en manoj de tiuj sinjoroj. La etnobelaro organiziĝis kontraŭ la grandsinjoroj, kaj la centra potenco apogis ilin por kontraŭpesi iom la baronaron. Pro samaj prikonsideroj, Sigmundo ankaŭ favoris la evoluon de la urboj, kies pligrandiĝinta ekonomia potenco kontentigis en ĉiam pli alta nivelo la bezonon pri mono por la trezorejo. Samtempe daŭre grandiĝis la ŝarĝoj premantaj la kampularon. Sigmundo enkondukis novajn impostojn, kaj ankaŭ la bienposedantoj altigis la sumojn, kiujn la servutuloj devis pagi al ili. La kampularo de la sudaj provincoj de la lando, krom tio, suferis ankaŭ la konsekvencojn de la senĉesaj atakoj de la turkoj.

La feŭda subpremo kaj la turkaj detruadoj kreis taŭgan medion por la disvastiĝo de la Husaj doktrinoj, predikataj far pastroj, kiuj revenis de la Praga Universitato. Post diversaj, pli aŭ malpli grandaj ribeloj, en 1473 okazis en Transilvanio la plej granda ribelo de la kampularo, gvidata de Antal Budai Nagy. Komence la ribelintoj akiris kelkajn venkojn, ĝis estis disbatitaj de la feŭdaj fortoj, kion sekvis sangaj revenĝoj.

La posteulo de Sigmundo sur la trono de la lando estis, dum mallonga periodo, Alberto Habsburg (1437–1439); post lia morto komenciĝis akraj internaj koliziadoj. La barona Ligo Garai-Cillei volis surtronigi la plej junan filon de Alberto, Ladislaon, kaj samtempe la nova klaso de grandsinjoroj, elformiĝinta dum la reĝado de Sigmundo, kaj kune kun ili la nobelaro de la provincoj deziris elekti la polan reĝon, Ulászló de Jagello la 3-an La ligo Garai-Cillei federiĝis kun la Habsburgoj kontraŭ Ulászló la 1-a (1440–1444). Sed János Hunyadi, elstara militestro kaj ŝtatisto de sia epoko, venkis la trupojn de Garai kaj per lerta manovro li sukcesis gajni por la afero de Ulászló la plej grandan potenculon de la malamikaro, Miklós Újlaki, kaj tiel fortikiĝis la pozicio de la nova monarko.

Hunyadi, devenata de meznobela familio, altiĝis ĝis la rango de grandsinjoro. El paĝio li fariĝis oficiro, en Italio kaj Bohemio li studis la strukturon de la modernaj soldularmeoj kaj ekkonis la signifon de la infanterio kaj artilerio. Lia kariero, simila al vojlinio de kometo, estis atribuebla al lia genio kaj kiel militestro kaj kiel politikisto. Hunyadi fariĝis unu el la plej potencaj bienpocedantoj de la lando, barono, vojevodo de Transilvanio kaj militestro en la kontraŭturkaj bataloj. La kernon de lia armeo formis liaj fideluloj, parencoj kaj feŭduloj sed li sukcesis altiri al sia flanko ankaŭ la popolajn amasojn, la kampularon malesperintan pro la turkaj atakoj, kaj la burĝaron de la urboj. Sub tiuj kondiĉoj li povis trudi, en 1442, gravan malvenkon al la turkaj trupoj enpenetrintaj en Transilvanion. En la sama jaro li transiris la Karpatojn kaj alvenis ĝis Valakio, kie li denove venkis la turkojn. Post tio, aŭtune de 1443 okazis la fama „longa militiro", kiam Hunyadi enpenetris en la Balkanon. Kvankam li rikoltis multajn venkojn, ne sukcesis atingi definitivan triumfon, nome, forpeli la turkojn el Eŭropo.

Aŭtune de 1444, post la „longa militiro", Ulászló la 1-a je la peto de la papo komencis novan kampanjon kontraŭ la turkoj. Liaj trupoj antaŭenmarsis direkton de la Nigra Maro, ĉar la reĝo pensis, ke tie li estos helpata de la armeo oficanta ĉe la marbordo. Sed la armeoj de la italaj urboj ne donis al li la promesitan helpon; eĉ okazis, ke la veneciaj ŝipoj, kontraŭ bona elpago, transportis la turkajn trupojn tra la Bosporo. Rezulte de tio, la batalo ĉe Varno finiĝis per la triumfo de la turkoj, kaj pereis ĉi tie ankaŭ la reĝo, Ulászló 1a 1-a.

Tr.: *VHZS*

Noto: Ulászló la 1-a (Wladislaw, Vladislaus, Vladislavo) estis ano de litovdevena pola dinastio Jagello. Laŭ la numerado de la dinastio li estis 3-a, laŭ la numerado de hungaraj reĝoj la 1-a.

Julius Balbin

VIAJ MIAJ



viaj okuloj mia rigardo viaj lipoj miaj kisoj via suno mia varmo via hardo mia nardo via luno mia nokto viaj steloj miaj irizoj via dormo mia gardo viaj sonĝoj miaj imagoj via vekiĝo mia espero via simplo mia dokto via grimaco mia alarmo via logo mia ardo via pafcelo miaj sagoj via mensogo mia vero via forno mia fajro viaj bordoj mia maro via voĉo mia kanto viaj dornoj mia rozo via ero mia aro via solo mia serajlo via tio mia ĉio via vario mia konstanto via gajeco mia morozo via realo mia fantazio via fortreso mia sieĝo via juno mia aĝo via vulkano mia lafo via deziro mia plenumo via templo mia preĝo via altaro mia ofero via beleco mia malsaĝo via erupto mia volupto via karno mia deliro viaj karesoj mia tenero via ĉielo mia humo

via rifuzo mia malnupto via adiaŭo mia hororo via foresto mia infero via lontano mia sopiro

via reveno mia aŭroro via kolero mia tolero via korpo mia parfumo via vundo mia doloro viaj manoj mia hararo via vazo miaj floroj via gorĝo mia pendumo viaj tordoj mia klaro via amoro mia agapo viaj brakoj mia langvoro via lampo mia lumo viaj gamboj mia kapo via ravo mia tranco via puŝo mia tiro viaj koksoj mia horizonto via boato mia rivero viaj femuroj miaj lumturoj viaj paŝoj mia danco via nudeco mia senhonto via ascendo mia subiro viaj vejnoj mia sango viaj suroj miaj ĵuroj via brusto mia spiro via nabo mia kanabo via balustro mia stango viaj konturoj miaj postspuroj viaj gluteoj miaj hemisferoj viaj kapricoj mia profundo via ventro mia ebrio via pordo miaj ĉarniroj via forĝejo mia fero viaj cicoj miaj delicoj via buŝo mia lango viaj piedoj mia grundo via pubo mia inkubo

via lico mia vico via atendo mia pretiĝo via ekkuŝo mia ekkrio via emo mia premo via subiĝo mia eniro via ingo mia vringo mia ektuŝo mia lavango via svingo mia klingo via prefero mia karcero via ĝemo mia poemo viaj suspiroj mia spasmo via vakuo mia abundo via epicentro mia tertremo via nio mia utopio via leĝero mia ĝisfundo viaj enbrakoj mia feliĉo

via lacigo mia despero via perfido mia fidelo via fridiĝo mia mizero via pluŝrumpo mia pliŝvelo via plezuro mia puno

via havo mia esto via eko mia ado via futuro mia nuno via sporado mia ĉiamo via jeso mia neo via frivolo mia severo viaj scenoj mia dramo viaj ludoj mia veo via flirto mia amo

Parizo, 1976

Béla Hules

Tri ludoj

Do, ekparolu – flustris flava KRADO.
Ho, ekparoli – ĝenis sin Ĝenev'.
Kaj kion ili faris, nek la nev',
nek lia onklo povis al si KREDI.

*

Grafo Petro
surgrimpis la kukumarbon,
rigardis, ĉu maturiĝas la kukumo,
kaj li malsupreniĝis.

*

Se senorelaj orelumas,
tiam la pomoj ore lumas.
Se suno-reloj relo-amus,
tiam la pumoj are lamus.

Fabelo pri la ĵugistoj

La juĝistoj juĝis false
kaj ne troviĝis ne falsa juĝisto.

kaj prijuĝis la juĝistoj la juĝistojn
la falsaj la falsajn
pro falsa juĝado.

Kaj la juĝistoj prijuĝis la juĝistojn
ĉar tiuj prijuĝis la juĝistojn
ĉar tiuj prijuĝis la juĝistojn.

Kaj ĉiuj juĝantoj de la juĝistoj
prijuĝis la juĝantojn de la juĝistoj.

Kaj tiujn ĉi juĝantojn la juĝistoj prijuĝis.

Kaj prijuĝis la juĝistojn la juĝistoj
la juĝistoj la juĝistojn
la juĝiston juĝisto.

Kaj kiu tion ne prijuĝis
tiu estis prijuĝita.

Adiaŭ, Milda Poeto!

Li naskiĝis la 29-an de novembro 1902 en Budapeŝto kaj mortis ankaŭ tie la 15-an de julio 1978. Lia vivo ne plenas de aventuroj. Li estis kalkulisto-oficisto, poste pensiulo, dum kelkaj jaroj, kiam la Budapeŝta Radio emisiis Esperante, li estis kunlaboranto de tiuj dissendoj. Jen ĉio. Ĉu ĉio? Ne! Lajos Totsche-Tárkony esperantistiĝis en 1919, do en bubaĝo, kaj laŭ sia propra konfeso:

Oni revenas al la am' malnova.
Ekde l' knabaĝa versĉarpento prova
tra malfideloj ĉiam min relogas
jen ankaŭ nun la lingvo Zamenhofa.

Ludoviko Totsche debutis sur la scenejo de la fama Literatura Mondo kiel verkanto de kritikoj, recenzoj. Eble li estis la unua vera recenzisto-kritikanto Esperanta, kiu eĉ ĝis nun havas malmulte da posteuloj. La plej valoraj pecoj el lia kritikista verkaro aperis en volumeto *De paĝo al paĝo* (1932, dua eld. 1977). Poste li ekpublikigis poemojn, el kiuj la plej elstaraj eniris la antologion *Dekdu poetoj* (1934). En 1936 sur la paĝoj de Literatura Mondo li denove ekaktivas kun pseŭdonomo Lali Blond, per tradukoj, recenzoj, poemoj.

Kaj kio okazis poste? Mallumaj jaroj de faŝismo, de milito, kies bombo detruis lian loĝejon kaj eĉ lian bibliotekon, kiu estis lia plej kara havaĵo.

Venis paco, releviĝo kaj denove silento. En Esperanto tiam ne eblis publikigi Hungarlande. Sed kiam ekaperis Hungara Vivo, Lajos Tárkony (intertempe li hungarigis sian familinomon) fariĝis ĝia aktiva kunlaboranto.

En malfacilaj jaroj Tárkony – kiel li mem konfesas en la cititaj versoj – foje-foje eĉ malfidelis al la internacia lingvo. Li verkis hungare kaj itale.

En 1964 aperis lia sola poemvolumo, *Soifo* en La Laguna ĉe Juan Régulo Pérez. La libro entenas preskaŭ la tutan poezion de Tárkony. La antaŭparolanto de tiu verko (fakte „verkaro") estis Kálmán Kalocsay. Li – laŭ la vortoj de la milda poeto – estis la plej bona amiko de Tárkony. Ne mirinde do, ke la morto de Kalocsay tiel ĉagrenis lin. La plej granda grandulo de Esperanto en siaj antaŭ-vortoj skizas la vivovojon kaj la poetan karieron de Tárkony, dividante ĝin en tri periodoj. Pri tio nun ne temu. Prefere, post nova relego de Soifo, mi volus montri la poetan memon de Tárkony.

La versoj pentras portreton de homo sentema, inteligenta, erudicia. Lian animon tuŝas eĉ la ŝajne plej banalaj fenomenoj: enfenestra petunio, tralegita aventurromano, bongusta vespermanĝo en restoracio. Li sidas en silenta ĉambro, aŭskultante la paŝojn de *„silento, solo kaj vespero, triopa, trista gard' "*, nur en siaj „libroj amataj" li trovas riĉon, tiun de la monda kulturo. Antaŭ liaj okuloj aperas ĝiaj granduloj, kiuj kapturnige svarmas en versoj de la grandioza poemo *Okcidento*. Li ĝojas pri la festo de la Unua de Majo kaj indigniĝas pri faŝismo.

De vivproblemoj li ofte eskapas al amataj grek-romiaj mitoj, kiujn li pasie reverkadas en persdevenaj „tririmoj" (rubajoj).

Per tririmoj Tárkony esprimas ankaŭ sian estimon pri granduloj de Esperanto. Ankaŭ pri tri hungaraj poetoj - Ady, Babits kaj Attila József – li verkas po unu rubajon. El la tri poetoj la majstro de Tárkony estis Mihály Babits, kiu multe influis lian verkadon junaĝan. *„. . . sufoki devis mi ĉi sanktajn eĥojn /por aŭdi sonon de la voĉo propra"* – li diras.

Tamen li tion fari neniam povis tute. En la allogiteco al fajnaj, cizelaj formoj (soneto, rubajo, pantuno, japanesko) kaj precipe en tiu al la aliteracioj oni sentas spiritmanon de la iama idolo. Ekzemple:

Sub mia fenestreto arbeto petunia
per siaj ĉielbluaj petaloj pale pompas . . .

(Komparu ĉe Babits: „*b*arangoló *b*orongó, ki *b*amba *b*ún *b*orong . . .") Sed ĉu tio estas eraro? Tute ne! Ĉi tie la poezia eco Babits-a estas jam tute Tárkony-igita.

Kion plu diri? Mia amiko, post la morto de Tárkony diris: „Li estis homo, verkinta belajn versojn". Dum la tralego de Soifo mi retrovis la vortojn de Kalocsay, fermantajn la antaŭparolon: *„Mi . . . finas ĉi tiun enkondukon per la naiva apreco, per kiu la mezepoka skribisto subskribis la kopiitan manuskripton:* ⟨⟨Legu, ĝi estas bela⟩⟩"

Per la du parafrazoj de la sama penso ankaŭ mi finas. Adiaŭ Lajos Tárkony, adiaŭ oĉjo Lajos!

Péter András *Rados*

La recidono de tiu ĉi libro de Tárkony – aperinta la unuan fojon ĉe LITERATURA MONDO en la jaro 1932 – volas kontentigi la lastatempe vekiĝintan interesiĝon pri la historio de la esperanta literaturo. En tiu ĉi volumo aperas eseoj pri dek esperantistaj verkistoj: interalie du gravaj, ampleksaj studoj pri Kalocsay kaj Baghy. La libron fermas ĝisdatigita bibliografia sekcio.

121.p., 19 cm., broŝ.
Prezo: 12,- ned.gld.

De maldekstre – dekstren: György Bjelik, *direktoro de la Hungara Kultura Centro, Ferenc* Molnár, *hungara ŝtatsekretario pri kulturo, Milán* Klusák *ĉeĥa ministro pri kulturo kaj Miklós* Barity, *hungara ambasadoro en Prago.*

Kulturo pliprofundigas amikecon

Nova Hungara Kultura Centro estis inaŭgurita la 11-an de oktobro en la strato Rytirska en Prago. La trietaĝa, moderne ekipita domo konvenas por esprimi kaj servi la amikajn kontaktojn kaj prezenti kulturajn kaj sciencajn rezultojn de Hungario. Sur nia bildo György *Bjelik,* direktoro de la centro salutas la partoprenantojn de la malferma solenaĵo.

La normigo ne estas malhavebla en la kunlaboro

La 12-an de oktobro okaze de la tutmonda tago de normigo profesoro V. V. Bojcov, prezidanto, kaj Olle Sturen sekretario de la Internacia Organizo pri Normigo turnis sin kun alvoko al la gvidantoj kaj fakuloj de normigo en la mondo. Ili emfazis, ke la laboro sur ĉi tiu tereno ne estas malhavebla por la plua evoluo de la kunlaboro. Grava intereso de ĉiu lando estas prilabori komunajn normojn kaj ju pli vaste apliki ilin.

La Internacia Organizo pri Normigo en Ĝenevo havas ĉiam pli grandan rolon en la internacia teknika kaj ekonomia kunlaboro. La nombro de ĝiaj membro-ŝtatoj jam altiĝis ĝis 86 kaj tiuj landoj reprezentas preskaŭ 98 procentojn de la tutmonda produkto La nombro de la normoj emisiitaj de ION nuntempe estas 3500 kaj laŭ la planoj ĉi tiu nombro en 1980 atingos kvin mil. Honorigon kaj rekonon signifas pri la laboro de hungaraj fakuloj, ke en la superan gvidorganon, en la sepmembran plenumkomitaton oni elektis D-ron József Olajos, prezidanton de la Hungara Oficejo pri Normigo.

D-ro József Olajos parolas en internacia konferenco de normigo en Budapest

PANOR

INFANĤORO DE LA

Tiun infankoruson komencis organizi aŭtune de 1954 Valeria *Botka* kaj d-ro László *Csányi.* La koruso debutis en februaro 1955 kaj iĝis tre rapide popularа. En 1959 ili la unuan fojon havis sian eksterlandan turneon, kaj dum la lastaj kvin jaroj ili turneis en preskaŭ ĉiuj landoj de Eŭropa krome koncertis en Ameriko kaj Japanio.

La Radio havas sonarkivon pri preskaŭ 800 korusverkoj el iliaj koncertoj. El inter la lastaj ni mencias sep infan –operojn; precipan sukcesan havis la fabelopero de Sándor *Szokolay:* „Printempon alportanta knabineto", kies libreto pretiĝis laŭ fabelo de Francisko *Móra,* fama hungara verkisto. Tre popularа estas la gramofondisko pri *„La eta kamenpurigisto"* de *Britten*

RAMO

Partoprenantoj de la konferenco de ministroj pri supera instruado

HUNGARA RADIO

kaj alia infanopero *„La venkinta nekonato"* de György *Ránki.*

Grava tasko de la infankoruso estas la konigo de la nova hungara korusarto, popularigo, publikigo de tiuj estas sekvo de ilia arta aktivado. En monda rilato estas grava la pradebuto de la infankantato: *„Das Namenfest"* (La nomtago) de *Sussmayr* kiun la komponisto verkis en 1799. Li estas konata kiel adepto de *Mozart.* Kaj ke li verkis la lastajn taktojn de *Rekviemo* de Mozart...

Kaj en Hungario kaj en eksterlando aperis diskoj de la Koruso, el tiuj plej valoraj estas tiuj de la Hungara Diskofabrika Entrepreno kaj la disko pretitigita pri la koncerto en la Nov-jorka *Carnegie Hall.*

Tr. A. *Pechan*

Konferenco de ministroj pri supera instruado

La 11-a konferenco de ministroj pri supera instruado de la socialismaj landoj estis aranĝita inter la 17-a kaj la 19-a de oktobro en Balatonaliga, Hungario. La interkonsiliĝon partoprenis delegacioj el Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Germana Demokratia Respubliko, Hungario, Kubo, Laoso, Mongolio, Pollando, Rumanio, Sovetunio kaj Vjetnamio. La partoprenantoj diskutis pri aktualaj problemoj de la edukado de esploristoj kaj instruistoj laborontaj en institucioj de supera edukado.

En la kadro de ĉi tiu konferenco estis aranĝita la interkonsiliĝo de reprezentantoj de junularaj organizoj en kiu oni diskutis pri kunlaboro de sciencaj studentaj rondoj kaj oni trarigardis ankaŭ la situacion de la stipendiuloj lernantaj en la socialismaj landoj.

Hungaraj verkistoj en la PEN-renkontiĝo en Barcelona

Kunsidis la plenumkomitado de la Internacia PEN -kaj ankaŭ literatura konferenco de ronda tablo okazis la 12–13-an de oktobro en Barcelona. La partoprenantoj de la konferenco diskutis – laŭ hungara iniciato – pri traduko kaj internacia disvastigo de literaturoj de malmulte konataj lingvoj. La Hungaran PEN Klubon reprezentis Iván *Boldizsár,* László *Kéry* kaj István *Örkény.*

Artensemblo VASAS jubileas

Ĉi jare festis la 15-an datrevenon de sia fondiĝo la Centra Artensemblo de la Sindikato de Ferlaboristoj. Multnombraj en- kaj eksterlandaj sukcesoj premiis la senlacan, entuziasman laboron de la membroj kaj gvidantoj. Ankaŭ en esperantista rondo estas konata la Ensemblo „Vasas", nome en 1972, okaze de la Hungara Esperanto Kulturfestivalo ĉi tiu ensemblo kantis – eĉ Esperantlingve – antaŭ la internacia publiko.

Dancistoj de la Artensemblo „Vasas" en la jubilea, solena programo.

REVUO DE REVUOJ

Rapidkura epoko estas la nia. Kaj tam esperantistoj ankoraŭ longe memoros la 63-an Universalan Kongreson en Varno, ne mirinde do, ke niaj revuoj abunde resonas pri ĝi. Tra persone koloritaj artikoloj preskaŭ en agordo estas legeblaj: plej amasa manifestacio de la movado; triumfo de E-o; unika kaj eventoriĉa; neforgesebla, senriproĉa Junulara Kongreso; ktp. Mi devas konsenti kun la sprita „ekskuzo" de *Simo Milojević*, redaktoro de ESPERANTO: en la raportoj oni (devis) forkonsumi la tutan provizon de la plej flataj epitetoj! La sveda LA ESPERO *(Franko Luin)* metis la akcenton prave al la – de *Humphrey Tonkin* prononcita – epiteto: „la plej universala el la Universalaj Kongresoj", vere *„la universala„*. Rajte! Pro la kvin-milo da esperantistoj; pro la kvin-kontinenta partoprenado, vastega kiel neniam antaŭe; pro la *proporcia* reprezentado de l'aĝoj, do pli juneca aspekto; kaj pro la senteble pli harmonia atmosfero, sekve de tiu aspekto. (LA ESPERO plenumis taŭge sian propagandan funkcion, kiam ĝi publikigis *nacilingve* la raportojn pri Varno.)

Kvazaŭ aldone al la supraj triumfoj eksplodis en Esperantio furora bombo(no): aperis la provnumero de la semajna SEMAJNO, revuo revita! Internacia, nemovada, abunda magazino – Esperantlingva – neamatora; leginda laŭ la plej diversaj interesoj, distra ankaŭ por la familio, kun aktualaĵoj kaj gravaj aferoj de la mondo; bunta kaj ilustrita, sur bone papero eminente presite: jen koncize kion la provnumero per gratulinda maniero prezentas al la gape surprizitaj legantoj. Ŝajnas aparte utila ĝia ebleco, estante tamen esperantista, kolekti originalajn raportojn el ĉiu angulo de nia globo rekte de „indiĝenoj". Tiu avantaĝo probable igos la magazinon per si mem varia laŭ temoj, kaj laŭ vidpunktoj, pensmanieroj, kio aparte konvenas por igi pli kara la vidhorizontojn en la mondaj aferoj. Por la dezirinda sukceso de Semajno estas bezonata vasteco kaj nefermiteco de la Esperante leganta medio . . . Inverse, por la dezirinda disvastiĝo de E-o estas bezonata tiaspeca, profesinivela magazino, vere konkurkapabla kun nacilingvaj magazinoj. *Por firmigi* la uzantaron de nia lingvo, *por gardi* la lernantojn, la semojn, kiujn semas konstante nia diligenta kolegaro, grave povas helpi la Semajno. Scivole kaj samideane ni atendas la disvolviĝon kaj la prosperon de Semajno, la *daŭran kaj regulan* aperon ekde la Novjaro. Por enigmoj kaj konkursoj premiojn disdonos la nova revuo; la ĉefan premion jam nun certe meritas la redaktoro *Stefan Maul* pro la numero nul, aperinta en *Aŭgsburgo* – espereble bona *aŭguro!*

Iuj interkonsentas, aliaj malkonsentas. Ĥaoso daŭras en la ĝenerala asembleo de Unuiĝintaj Nacioj, kompreneble nur lingva. Reprezentantoj de bravaj ŝtatoj obeeme sekvas la interkonsenton pri „oficialaj" lingvoj, kaj dum la gravaj debatoj ili parolas per unu el tiuj „oficialaj". Ŝvitu la interpretantoj . . . Pro miro kaj surprizo mi eksaltis de la seĝo, kiam mi legis en „UN kaj NI", bone informita bulteno de UEA, ke troviĝas ankaŭ malbravaj ŝtatoj, kies reprezentantoj obstinas, oponas la grandiozan solvon de la „internaciaj" lingvoj, deflankiĝas de la bela interkonsento. Ili simple uzas *sian propran lingvon*, la japanan, serbokroatan, portugalan, italan kaj aliajn, sed la siajn! Kial ne . . . Aŭ: kial la lingvon de alia ŝtato? Kaj mi ekfantaziis, kiel elektis lingvon por alparolo ekzemple Albania diplomato? Ĉu la anglan aŭ la rusan? Hm . . . Ĉu la ĉinan? Eble post kelkjardeka lernado . . . sed pro politika turniĝo eĉ tio ŝajnas evitinda. La araba kaj la hispana, samtiel oficialaj en UN, ne estas konataj de la albano, kvankam politika konsiderado ne kontraŭas tiujn. Restas do la franca, lingvo de meza potenco, tradicia diplomatia lingvo, do „kvazaŭ neŭtrala" . . . Almenaŭ ĝis la ŝtatoj rimarkos, ke preferinde estas „sur neŭtrala lingva fundamento" diskuti, sen koincido pro politikaj rilatoj.

Pri la Pupteatra Internacia Festivalo plej rapide raportis kompreneble la NORVEGA ESPERANTISTO, tio okazis ja en *Tromsö*, unuafoje ekster Jugoslavio. Laŭ raporto pri tiu grandsukcesa festivalo, dudek spektakloj okazis E-lingve fare de sepdek artistoj, venintaj el kvin landoj; la norvega *televido* filmigis du spektaklojn (de *Zagreb* kaj de *Baia Mare*, Rumanio), do la ĝis tiam en Skandinavio ne interesiĝanta televido estis konkerita. Antaŭ pli ol 40 jaroj norvega junulo plenumis longan propagando-vojaĝon por E-o en Hungario; nun li, *John Berggreen*, laboris kiel unu el la ĉefaj organizantoj de tiu festivalo.

Diablo scias, kial estas tre malofte legebla en nia gazetaro artikolo pri la tradukarto. Mi foje miras pri tiu manko, kio tiel prezentas (pli precize: malprezentas) sin ĝuste en nia lingve orientita kaj tradukadon ade aplikanta E-socio! Ĉu ni akuzu la regantan amatorecon? Aŭ la troan ŝarĝitecon de la spertuloj, kies cirkonstancoj foruzas la energion, kaj ili ne povas teorumi pri la propra metio? Kiel ajn estas, tiu gravega afero meritus pli da atento de la redaktoroj. Nia rubriko, la *Literatura Metiejo* iom klopodas fosi sian sulkon. Des pli salutinde, ke ESPERANTO EN SKOTLANDO – modestaspekta, sed interne eminenta – gazeto publikis mallongan eseon pri kelkaj rimarkindaĵoj koncerne tradukadon. Mi sentas kvazaŭ devo citi de *Tom Fraser* tiajn asertojn: bona traduko devas, iel, sin malaperigi: ĝi devas ne montri, ke ĝi estas traduko; ĝi devas veki kiel eble plej samajn sentojn ĉe la publiko – kiel la originalo ĉe *sia* publiko. Por multaj tradukemuloj validas lia aserto: „plene regu ambaŭ lingvojn – la tradukatan kaj la tradukan – kaj zorgu *plene kompreni* la tekston tradukatan."

Lingvaj disputoj turniĝas ververe nur ĉirkaŭ kelkaj aksoj, kaj tio estas jam vere pripensinda afero – skribas *Violin Oljanov* en PACO (78/2). Prudenta artikolo, kiu laŭvice demonstras, ke malnovaj diskutproblemoj, konstante ripetiĝantaj ekscitas ofte ĝis insultoj la disputantojn, malebligante la seriozan interŝanĝon de opinioj. Diskuto utilas tiam, kiam sur scienca fundamento (nepre sur la Fundamento), kun lingvistikaj konoj, tolereme disvolviĝas la diskutoj. Prave skribas Oljanov, ke *nur la vivo*, la longdaŭra praktikado povos solvi – kaj ne hasta maniero – la malnovajn problemojn, kiel ekzemple la demandon de la propraj nomoj, de la geografiaj nomoj, kaj tio rilatas ankaŭ la nove-denove aperantajn „naciismojn". Kontraŭbatali tiajn tendencojn, kiuj enŝovas en la IL-on naciajn formojn, ne kompreneblajn internacie, estas ja nia devo, t.e. gardi la internaciecon de nia lingvo evitante anglismojn, francismojn, hungarismojn kaj la aliajn.

Ervin *Fenyvesi*

Tridek jaroj de la hungara filmarto

„Karuselo" de Zoltán FÁBRI

Antaŭ tridek jaroj okazis grava ŝanĝo en la vivo de la hungara filmo: la ŝtato prenis en siajn manojn ĝian direktadon. Tiu ĉi datreveno sugestas fari bilancon: kio okazis dum la pasintaj tri jardekoj en la hungara filmo?

Antaŭ la dua mondmilito la hungara filmproduktado estis kvante impona, sed esence ĝi estis nur parto de la amuzindustrio. La nova socio heredis tiun staton, sekve la unua celo estis krei *filmarton*.

La unua grava paŝo por realigi tiun celon jam estis farita jaron antaŭ la alŝtatigo per *Ie en Eŭropo* (filmo de Géza *Radványi*, 1947); en tiu ĉi humanisme agordita filmo la unuan fojon povis montriĝi la spirito de la nova sociordo.

La alŝtatigo kaj struktura reformo de la filmindustrio kreis ankaŭ ekonomian bazon por la hungara filmo. En la unua periodo la hungara filmo sekvis du tendencojn. Unu el tiuj estis filmigo de literaturaj verkoj. Ĝis nun la plej temprezista peco de tiaj filmverkoj estas la unua produktaĵo de la alŝtatigita filmindustrio: *Subplando da tero*, kiun preparis reĝisoro Frigyes Bán laŭ romano de Pál *Szabó*. La alia tendenco strebis prilabori la materialon, kiun liveris la nova vivo: la fruktoj de tiu ĉi laborado postrestis al la nivelo de la literaturaj filmadaptaĵoj.

La hungara filmo bezonis apenaŭ jardekon por elprovi siajn eblojn, pesi siajn fortojn kaj kapablojn, kaj pli konsekvence klopodadi en la realigo de sia socia misio. Tion spegulas la filmoj de la tn. unua periodo: *Karuselo* kaj *Sinjoro profesoro Hanibalo* de Zoltán *Fábri*, *Naskiĝo de Menyhért Simon* de Zoltán *Várkonyi*, *Abismo* de László *Ranódy*, *Budapeŝta printempo* kaj *Glaseto da pala biero* de Félix *Máriássy*, *Lilionof* de Károly *Makk*. En tiu ĉi periodo akiras la hungara filmo siajn unuajn eksterlandajn sukcesojn.

Nia filmarto vere noviĝis depost la jaro 1958. Tiun noviĝon multe akcelis la enkondukitaj strukturaj ŝanĝoj, kaj ankaŭ la kreskigo de la nombro (ĝis jare 20) de la produktitaj filmoj. Elstara reĝisoro de la komenco de tiu ĉi periodo estis Károly *Makk (Domo sub la rokoj, Fanatikuloj)*.

„Amo" de Károly MAKK

„Adopto" de Márta MÉSZÁROS

* Pri la hungara filmarto pli detale oni povas legi en n-ro 1/1977 de HV.

** Farita laŭ romano de F. *Sánta*, tradukita en Esperanto.

*** Farita laŭ rakonto de T. *Déry*, aperinta en n-ro 5/1974 de HV.

**** Vidu fotospecimenojn el tiu filmo en n-ro 4/1978 de HV.

En la unua duono de la sesdekaj jaroj la sociaj ŝanĝoj certigis por la filmarto respondecan socian rolon. Naskiĝis nova sinteno ĉe la kreantoj, karakterizata de senmanka prezento de la realo, seniluzia arta prilaborado de la pasinto kaj strebo al sobra nacia sinkono. Tiun ĉi tendencon reprezentis tri elstaraj filmoj: *Dudek horoj* ** de Zoltán *Fábri*, *Malvarmaj tagoj* de András *Kovács* kaj *Betjaroj* de Miklós *Jancsó*. En tiu ĉi periodo debutas aro da novaj reĝisoroj, poste famiĝintaj (István *Gaál*, Sándor *Sára*, István *Szabó*, Ferenc *Kósa*, Pál *Sándor*, Judit *Elek*, Zsolt *Kézdi Kovács*. Ilia arto enkondukas novajn esprimformojn, ĉiam pli filmecajn.

Fine de la sesdekaj kaj komence de la sepdekaj jaroj – sekve de la socia evoluo – la ĉefa atento turniĝas al la interna dinamismo kaj moveco de la socio. Pri la ŝanĝoj en la vivmaniero, la kontraŭdiroj kaj karaktero de la ŝanĝoj, kaj pri la serĉado respondi la demandon „kiel vivi?", plej forteĥike okupas sin la filmoj de Péter *Bacsó (Estanta tempo, Tria provo, Alarma paĵo)* kaj tiuj de Márta *Mészáros (Adopto, Naŭ monatoj, Ili du)*. Tio tamen ne signifas, ke ĉesis la strebado de la filmartistoj malkovri verojn, repensante diversajn periodojn de la hungara historio. Tia filmo estis – interalie – *Amo* ***, ĉefverko de Károly *Makk*.

Pliaj menciindaj verkoj estas la lirika filmo *Sindbad* **** de Zoltán *Huszárik*, novtipaj psikologiaj filmdramoj *(Fine, Kie estas Déryné?* de Gyula *Maár; Fremdaj vizaĝoj, Spegulbildoj* de Rezső *Szörényi)*. Karakteriza fenomeno de la filma kreado dum la lastaj jaroj estas ia dokumentismo, la likvido de la striktaj limoj inter filmoj dokumentaj kaj artaj. Tio ne estas nura arta rimedo, sed ankaŭ manifestiĝo de nova perceptmaniero, kiu esploras kaj malkovras la kontraŭdirojn, serĉas la artajn modelojn de la moderna homa sinteno. Tiaj filmverkoj estas *Fotografio* de Pál *Zolnay*, *Simpla historio* de Judit *Elek*, *Vojaĝo al Britujo* kaj *Filmromano* de István *Dárday*, *La diablo batas sian edzinon* de Ferenc *András*.

Tiu ĉi konciza revuado se ne pruvas, almenaŭ ĝi konjektigas: la hungara filmproduktado fariĝis *filmarto*, kiu jam estas inda „ambasadoro" de la hungara kulturo en ĉiam pli multaj landoj de la mondo.

Tradukis: *V. B.*

Eblaĵoj de Esperanto

Denove kaj denove ekflagras diskutoj: por kio taŭgas Esperanto? Ĉu ĝi estas nura idiomo aŭ krome „interna ideo"? Pri tiu ĉi ŝajne eksmodiĝinta temo antaŭnelonge denove artikoladis kelkaj sovetaj kaj GDR-aj esperantistoj, kiuj pri la menciita problemo havas tute malsamajn ideojn. Kaj jen: en la 3a n-ro de HV oni povis legi tri artikolojn plus mencion de K. Piĉ pri la arkaikigo en Esperanto. La debatantoj denove havas tute diversajn opiniojn. Ne estas mia celo enmiksiĝi en la koncernan temon, kiun oni eble povus daŭrigi eĉ plurajn jarojn longe. Mi volus prefere prilumi alian aspekton de la demando. *Ĉu Esperanto estas vere egalrajta kun naciaj lingvoj? Ĉu ĝi havas la samajn eblojn? Ĉu ankaŭ en ĝi oni povas krei diversajn stilojn?*

Ĉi-koncerne mi deziras konigi kaj klarigi iuspecan „lingvan eksperimenton", aperintan ankaŭ en la 3a n-ro de HV.

Makro- kaj mikroeksperimento

Lingvo ne ekzistas por si mem. Ĉiu eldirita parolo, skribita vorto aldonas ion al ĝi. La tuta Esperanto-movado el tiu ĉi vidpunkto estas *modelo de la uzado de planlingvo. Iuspeca makroeksperimento.*

Elirante el tiu baza aserto, ni kun mia amiko Márton *Fejes* ellaboris „lingvaĵon" resp. lingvaĉon por la traduko de novelo de la hungara verkisto Tamás *Pintér* „Frazmodeloj". Ni elcerbumis vortojn *homulo, kaptitulo, diablaĵo, ceterafaroj, liberalismeco, personulo, aferaĵo, malmodestulece, eksidiĝi, scienculisto, devaĵo, interesaĵo, demandaĵo, deziraĵo, petaĵo.*

La cititaj vortaĉoj ŝiras la „orelojn", pli ĝuste la okulojn de la leganto, kvankam ili estas tute kompreneblaj, en ili oni ja tuj rekonas la vortojn *homo-ulo, kaptito, diablo, cetero, liberalismo, persono, afero-aĵo, malmodeste, eksidi-sidiĝi, scienculo-sciencisto, devo, interesо, demando, deziro, peto* (la vortoj, ligitaj per streketo estas la fontoj de kontaminaĵoj).

Al pli evoluintaj esperantistoj eĉ evidentas: temas pri *pleonasmoj,* kiujn siatempe *Kalocsay* karikaturis en la *Plena Gramatiko* (efektive ne facile akirebla nuntempe) per monstrovorto *„primadonistulino"*, kiu malĝustas malgraŭ tio, ke primadono estas *isto, ulo* kaj eĉ *ino.* Ĉar en Esperanta lingvouzo ekzistas (devus ekzisti) la *Principo de Sufiĉo kaj Neceso,* pri kiu – mi timas – ne ĉiu el ni aŭdis ankoraŭ. Laŭ tiu principo estas superflua ankaŭ la troa uzo de *ado,* pri kio same kulpas la prizoninspektoro, rolanta en la novelo.

Alia parto de la lingva ekperimento estis enigi malgrandajn sintaksajn erarojn en la paroladon de la „sinjoro inspektoro". Ekzemple: *„en la via kapo"*, *„konduti sin"*, *„mi devus esti unu oficiro"*.

La suprajn tri citaĵojn mi skribis ne tiel, kiel ili troveblas en la teksto. Ĉar ni kun ili faris eĉ pli danĝeran „aferaĵon": deziris iel montri fonetikajn ecojn de la lingvo far prizongardisto. En kelkaj kazoj ni duobligis la intervokalajn konsonantojn *(„ielle tielle"*, *„afferaĵo"*, *„absollute"* ktp.). La vortojn *ankaŭ, ankoraŭ ĉe prizongardisto ni uzis en* formoj *„onkoŭ"*, *„onkoroŭ"*. Krome: kune skribis multajn vortojn kun la sekvaj. Tiuj estis prefiksoj, pronomoj kaj la artikolo. Kaj fine: la *„s"* ĉe la fino de verboj estis ĉe li anstataŭigita per *„ss"*.

Kion celis ĉio ĉi? Nu, la tuto devus karakterizi homon, kiu parolas neeruditan lingvon.

Kaptit(ul)o kaj konat(ul)o

Sed ĉu ni sukcesis? Laŭ la ĝisnunaj reeĥoj mi kun bedaŭro agnoskas, ke verŝajne ne. Kial do? Ĉar *la lingvo, uzita en la traduko ne estis plene elpensita. La modeloj* de ĉiu tie trovebla fenomeno *estis prenitaj el la vivanta Esperanto.* Ĉar kiu ne konas ekzemple la neekstremeblan vorton *konatulo* anstataŭ la tute sufiĉa *konato,* kvankam la lastan subtenas Zamenhofa frazmodelo el la Fundamenta Ekzercaro: *„Kiam Nikodemo batas Jozefon, tiam Nikodemo estas la batanto kaj Jozefo estas la batato"*. (Kaj ne „batatulo" – P. R.) Aliaj ekzemploj: oni preskaŭ ĉiam uzas la vorton *organizaĵo* anstataŭ *organizo, geamikoj, geesperantistoj, gekamaradoj,* kiam la prefikso ge- estas tute superflua. Antaŭnelonge en aviadilo de la Hungara Aviadkompanio, veturanta al la Varna UK, mi aŭdis de esperantista „mastrino": „La aviadilo flugas en iksmilmetra *alteco.*", kiam temis pri nura *alto,* kiu ne estas *eco* (kvalito).

Preskaŭ ĉiam ankaŭ la „perfektuloj" uzas la vorton *„ebleco"*, kvankam ankaŭ ĉi te ne temas pri ia kvalito, sed pri simpla *eblo* aŭ *eblaĵo.* Kia ĉiutaga sperto estas jam la vorto *jaraĝa* anstataŭ *jara* aŭ *aĝa, aktivecoj* anstataŭ *aktiveco* au *aktivado, imperialismo* anstataŭ *imperiismo,* longa *promenado* anstataŭ eta *promeno* ktp.

Pri sintakso: ĉiu aŭdis frazojn kun superflua uzo de la artikolo, kun malregula uzado de po (ekz.: *„po-hore* tri kilometroj" anstataŭ *„pro tri* kilometroj hore").

„Ve, ĉio vana"(?)

Ĉu daŭrigi? Mi timas, ke eĉ ĝis nun mi fariĝis teda. Mi volis nur montri: la stilo far de la „sinjoro inspektoro" ne estis elpensita, eĉ ĝia fonetiko ne. Tio deziris transdoni la ecojn de hungarmaniera prononcado. Do, la descendan akcentmanieron anstataŭ la ĝusta ascenda, la oftan duobligon de konsonantoj, la elparolon de hungara *„a"* (sonanta simile al „o") anstataŭ la Esperanta *„a"*-vokalo.

Ĉu la nekomprenon (?) kaŭzis, ke oni ne volas rekoni siajn erarojn? Ĉu la nekutimeco de tia „inversa lingvonormigo"? Ĉar mi nun kunfesas: anstataŭ verki en brilega stilo, kion sopiras ĉiu Esperanto-verkisto kaj tradukisto, ni ĉikaze per tia „fuŝita" Esperanto volis atentigi la legantojn pri bona uzo de la lingvo.

Ĉu tio efektive vanas?

P. *Rados*

SÁNDOR SZATHMÁRI

KAIN KAJ ABEL

SZATHMÁRI VERKARO – KOMPLETIGITA!

La volumo enhavas 23 novelojn de la elstara prozisto, postparolon, kaj ankaŭ bibliografion de lia verkaro. 288 p., 19 cm. Prezo: 16.50 ned.gld.

CIRKOM Konferenco en Budapeŝto

Dum registrado de Don Juan en televida studio. Meze reĝisoro András Rajnai.

CIRKOM –fondita en 1973 en Venecio kun apogo de UNESKO – estas libervola ligo de televidistoj aŭ fakuloj okupiĝantaj pri televidaj esploroj, kies celo estas organizita progresigo de novaj metodoj per la helpo de internacia kunlaborado.

En septembro 1977 en la jarkunveno de CIRKOM en Venecio la membraro elektis en la estraron la hungaran András Rajnai, kunlaboranton de la Hungara Televido. Samtempe li estis komisiita organizi internacian konferencon pri la elektronika bildkombinado kaj la estetikaj, praktikaj kaj artaj demandoj de la baziĝanta sur ĝi elektronika dramo.

En ĉi tiu konferenco, la 25–27-an de oktobro 1978, fakuloj el 16 landoj raportis pri siaj rezultoj kaj prezentis siajn elektronikajn kreaĵojn. Ĉi tiu estis la unua internacia revuo de la nova televida artospeco.

Ni demandis s-ron A. Rajnai, kiu prezidis tiun konferencon, pri siaj impresoj koncerne la laboron de la aliaj partoprenintoj.

– Plej forte impresis min, ke ni ĉiuj iras sur la sama vojo, de la BBC ĝis la bulgaroj, de la italoj ĝis la sovetaj televidistoj. Nia komuna konstato estis krome, ke esence ni ĉiuj estas en malfruo.

Nome, kiam la TV naskiĝis unue oni aplikis simple teatrajn spertojn evoluintajn inter la 30–40-aj jaroj. Sed rapidege kreskis la nombro de la spektantoj kaj la dramaj programoj laŭ ĉi tiu metodo ne estis kontentigaj. La dua paŝo estis farigi filmojn pere de filmfabrikoj por televida uzo. Sed ĉi tiu teknologio estis tre malrapida kaj ege multekosta – do tiel fari amasprogramojn estis granda malprofito. Ĉi tiu preskaŭ krizo-situacio tutmonde devigis la televidistojn por eksperimenti per la metodo de bildkombinado. La kulisoj kreitaj pere de elektronika bildkombinado estas multe pli malmultekostaj (24 oble) ol la plej simplaj kulisoj tradiciaj. Krome tiel grandiozaj amasprogramoj, ravaj spektakloj, brilaj koloroj estas kreeblaj per ĉi tiu metodo, kiajn ne povas produkti eĉ la plej riĉe ekipitaj TV studioj.

– De kiam vi okupas vin pri tiu eksperimentado?

– Surbaze de hungara inventaĵo – la bildkombinado – mi laboras sur ĉi tiu kampo ekde la starto de la hungara TV, – do ek de 1958.

– Ĉu vi estis filmisto aŭ inĝeniero?

– Neniu el la du. Laŭ mia diplomo mi estas profesoro de historio kaj antaŭ 1958 mi estis sufiĉe konata kiel poeto. Certe vi miras kion komunan mi trovis inter mia mondo kaj la tekniko. Do, vidu, mi serĉis kiel farigas aperigebla la mondo de la fantazio, videbla la poezio. En nigra-blanka tekniko ni atingis signifajn rezultojn kaj ne estas hazarde, ke en 1972 ĝuste per prezento de fantaziriĉa poemo „Kanto pri la galaksio" ni gajnis premion „Eŭropo" en Triesto. – Komence la kolora televido iom skuis niajn rezultojn, sed esence tio donis la progreson kaj riĉigis la eblojn de la krea fantazio preskaŭ senlime.

– Ĉu tiu nova metodo havas jam siajn spertulojn?

– Bedaŭrinde ne sufiĉe. Tiu ĉi estas ĝenerala plendo ankaŭ en aliaj landoj; necesas urĝe eduki novajn fakulojn, en kiuj krom la teknika kapablo samrange agadas ankaŭ belartisto kaj libere flirtadas fantazio de poeto.

– Ĉu estas eble entute, ke iu preparu sin teorie por ĉi tiu laboro?

– Tiom ege rapide evoluas la televido, ke tiu, kiu volas labori ĉi tie ĉiam devas pensadi jam unu paŝon pli antaŭe ol la nunaj ebloj permesus, ĉar novaj pordoj abrupte povas malfermiĝi kaj ni devas esti pretaj. Ekz. la sovetaj televidistoj nun en la konferenco raportis pri spertoj rilate al la digitala teknologio, kiu dekoble plifaciligos la aplikon de ĉi tiu bildkombina metodo. – Al la teoria preparigo apartenas ankaŭ enprofundiĝo en studadon de la praa homa klopodo esprimi sin en bildoj. Intensive observante prezentiĝon de praaj kulturoj en abundo da bildoj mi trovis tie la radikojn, kiuj validas ankaŭ en nia epoko kaj ankaŭ en la plej altaj kulturoj.

Sed la pli nobla arto dum longa tempo alparolis nur malgrandan eliton kaj la amasoj ricevis nur senvalorajn amuzojn. Ĉi tie signifus revolucian paŝon, se ni povus alproksimigi direndon de altvalora literaturo – per la helpo de mirinde belaj bildoj – al diversnivelaj tavoloj de la spektantoj.

– Kial vi diras tion en kondicionalo?

– Ĉar ni devas ankoraŭ superi kelkajn problemojn, kiuj estas ne unuavice teknikaj, sed – ankaŭ laŭ la spertoj de la aliaj kolegoj – ofte la konservativismo de la estroj aŭ de la kunlaborantoj.

– Menciu kelkajn el la plej interesaj kreaĵoj prezentitaj dum la konferenco!

– BBC – kontraŭ sia konservativa famo – prezentis Neĝreĝinon de Andersen, kombinaĵon de desegnofilmo kun vivantaj rolantoj, filmon de poezia beleco. La TV de Köln alportis du filmojn, unu pri Prometeo kun titolo „Poemo de fajro". Belege ĝi montris kiel movo kaj vivo naskiĝas el la fajro. Ankaŭ la alia estis tre interesa: interparolado kun Salvador Dali pri iu imagita orienta lando, kie la strangaj fantasmagorioj de Dali laŭ la eldiritaj vortoj ekvivis kaj moviĝis. Ekscita estis „sciencfikcio" de la itala TV „La fatalaj ovoj" el la dramo de Bulgakov. Multe plaĉis al kolegoj la ĉarma filmo de Ilona Katkics, hungarino, pri la fabel-figuro Mákszem Matyi (Fingruleto). La kombinaĵo de desegno – animado – elektroniko, sen teksto nur kun muziko de la eksperimenta studio de la dana TV, montris tute individuan vojon. La Studio de Munkeno prezentis sub titolo „Sonĝo de Prosperos" la Tempeston de Shakespeare. Ni povis vidi ankaŭ tre spritan kaj amuzan instruadon pere de bildkombinado, liveritan de la bulgaraj televidistoj.

– Kiuj konkludoj naskiĝis dum la diskutoj post la prezentadoj?

Esence konkordo estis inter ni en ĉio. Ni diskutis nur pri la akcelado de la akceptigo kaj la evoluigo de nia artospeco, ĉar kiel mi jam menciis, ĉiu el ni devas lukti kontraŭ certa konservativismo. Naskiĝis krome interkonsentoj kaj pri ĝenerala kunlaboro kaj pri konkretaj spertointerŝanĝoj. Ekz. ĉeĥaj televidistoj volas konstrui sian eksperimentan studion kun utiligo de niaj spertoj. Ni planas kunlaboron ankaŭ kun la polaj kolegoj por transpreni rezultojn.

Ni esperas, ke la rezulto de ĉi tiu bonatmosfera konferenco kaj de la reciproka helpopreteco montriĝos en aprilo, en nia nova mondkonferenco en Milano.

– Ankaŭ ni deziras al via interesa kaj bela laboro multe da sukceso!

Éva Farkas-Tatár

PANNONIA









PANNONIA Eksterakomerca Entrepreno de UZINOJ CSEPEL

Budapest, VI., Bajza u. 26. 1062
Telegramadreso: PANEXPORT Budapest
Telefono: 228–850. Teletajpilo: 225128 PANEX–H,
Poŝta adreso: Budapest, P. f. 354. 1394

•

Fajnmetalurgiaj duonfabrikaĵoj por telekomunikada tekniko, elektra kaj elektrona industrioj

•

Inkandeskaj elektrodoj kaj kablokerno por pretigo de elektrodoj de temperature regulita fandofitingo[2]

•

Ŝtaltuboj
Ŝtalboteloj por oksigeno ktp.
Bicikloj por sinjoroj, sinjorinoj kaj infanoj
Biciklo-konsistaĵoj

•

Maŝinoj por la konfekcioindustrio
- Elektraj tajladmaŝinoj
- Kudromaŝinoj
- Gladmaŝinoj
- Gladilaro

Specialaj maŝinoj kaj iliaj subtipoj

•

Maŝinoj por lavejoj kaj por la teksaĵpuriga industrio

•

Kompletaj konfekcio-instalaĵoj por teksaĵ kaj led-konfekcio-industrioj

•

Kompletaj lavejoj kaj vestpurigejoj

•

Transportinstalaĵoj por konfekcio-fabrikoj kaj lavejoj

•

Prilabormaŝinoj por tuboj kaj stangoj
- Pintigmaŝinoj
- Tub-rektigaj, fleksaj maŝinoj
- Longigaŭtomatoj por tubo kaj stangoj

•

Spiraltub-veldejoj

•

Maŝinoj kaj uzinoj por produktato de senfugaj tuboj

•

Maŝinoj kaj uzinoj por ŝtalbotel-fabrikado

•

Maŝinoj kaj uzinoj por pretigo de arklum-veld-elektrodoj

•

Instalaĵoj kaj uzinoj por pretigi biciklo-konstruerojn, kaj por munti biciklojn

•

Konigo de Know-how[2] kaj teknologio, instrukcioj por fakpersonaro

[1] **fitingo** (PIV): kuniga interorgano (mufo, krano) de tubokondukiloj (por brulgaso, akvo); interĝustiga tubo, vaporkondukaj tuboj.

[2] **Know-how**: fabrikad-teknologio, »scii kiel«

Tr. Alfonso *Pechan*



Tri jardekoj de la ŝtata akvomastrumado

D-ro Ferenc László

En Hungario antaŭ 30 jaroj, en 1948 la ŝtato transprenis la organizadon de hidrologiaj laboroj. Per tiu fakto komenciĝis nova epoko de la hungara hidrologia prizorgado. La tiamaj bazaj principoj estis la elirpunkto por la laŭgrada elkonstruado de nia nuna hidrologia organizaĵo. Tiu grava decido kreis la eblon por sistema akvomastrumado, kaj la harmonion inter ĝi kaj la diversaj brancoj de la popola ekonomio, evoluanta sur socialismaj bazoj.

La alŝtatigo de la hidrologiaj organizaĵoj kunligis ĝin kun la socia kaj teknika progreso, kun la prospero de nia popolo.

Krom la taskoj, kiuj apartenis al la hidroteknikaj administracioj jam antaŭ tiu alŝtatigo, iĝis senpere ŝtataj aferoj la sekvaj:

– la laŭplana akvomastrumado, servanta la evoluigon de agrikultura produktado,
– la protektado kontraŭ inundoj kaj grundakvoj,
– aranĝado de akvofluoj ne prizorgitaj antaŭe de la ŝtato, kaj tie la prevento kontraŭ akvo-damaĝoj,
– hidrologiaj laboroj, kiujn plenumis pli frue akvoutiligaj kompanioj,
– la komuninteresa grundo-protektado,
– konstruado de gravaj akvovojoj.

Tiuj enhavas la tutan akvoekonomian agadsferon, escepte la komunuman akvoprizorgadon, kiu nur poste fariĝis branĉo de la akvomastrumado.

Por plenumi la unuecan akvotaskaron, la dekreto kreis centron: Landa Akvomastrumada Institucio. Kvankam tiu aŭtoritato – kune kun la samjare reorganizitaj teritoriaj hidrologiaj organizaĵoj – apartenis ankoraŭ al ministrejo, la nova institucio jam disvolvis sin por iĝi aparta ŝtatadministra branĉo kun unueca direktado kaj taskaro.

Kvankam tiu organiza unueco disiĝis inter 1950-53 – pro nekompreno de la ĝustaj hidrologio-direktaj principoj – tamen la afero restis plu centra ŝtata tasko. Kaj kiam (1953.10.01) kreiĝis sub egido de la ministro-konsilio la vere memstara, unueca hidrologia organizaĵo, oni plejparte revenis al la sistemo de jaro 1948, bazo de la nuna laboro.

La alŝtatiga dekreto likvidis la akvokompaniojn, kiuj adaptiĝis forte al la grandbienoj. Ilian posedaĵon prizorgi, kaj la taskojn plenumi iĝis devo de la Landa Akvomastrumada Institucio. Jardekon poste la hidrologia servo formis novajn akvokompaniojn de socialisma tipo.

Tiam komenciĝis ververe la *mastrumado,* surbaze de leĝoj de la naturo kaj de la socia evoluado. Kiel granda atingaĵo de la socialisma evoluo, de nun eblis sisteme koncentri kaj mobilizi fortojn de la socio kaj materie, kaj teknike.

La ŝanĝiĝinta rolo de la akvomastrumado en la popolekonomio montriĝis precipe en tio, ke la akvorilataj konstruadoj, kiujn antaŭe influis lokaj, izolitaj interesoj, nun atingis pli altan nivelon el socia kaj teknika vidpunktoj, kaj iĝis kompleksa akvomastrumado. Ĝiaj branĉoj evoluis harmonie, ankaŭ kun la ekonomiaj interesoj de la lando.

Okaze de la âlstatigo la hidrologia servo transprenis gravajn tradiciojn, sed samtempe heredaĵon malfacilan kaj ŝarĝitan per multaj farendaĵoj.

En 1948 nur 25% de la loĝantaro estis provizita per akvodukto, kaj nur 18% vivis sur teritorio kanalazita. Multaj el niaj urboj malhavis komunumajn akvoprizorgadojn, en vilaĝoj estis nekonata la akvoprovizado per akvoduktaro. La mastrumado per irigaciado estis aplikata nur por kelkaj dekmiloj da hektaroj kaj la forkonduko de la surgrundaj akvoj bezonis 35-40 tagojn.

Tiutempe ankoraŭ ne estis ĝenerala maŝinizado. La grundlaboristoj per ŝvitiga penado levis la digojn, fosis la kanalojn, kaj la durada ĉareto forportanta la elfositan teron estis „moderna" laborilo.

La tiama Landa Hidrologia Instituto kun granda elano komencis realigi siajn hidrologiajn taskojn en kadro de la trijara plano. Ekis la konstruado de la akvonodo ĉe Tiszalök kaj de la orienta ĉefkanalo, krome la efektivigo de la rizkulturado.

La registaro en 1949 kvalifikis *publika neceso* la provizadon de trinkakvo kaj kanalizado. Tiel en 1950 oni metis ankaŭ la akvoprovizon kaj kanalizon de la fabrikoj en agadsferon de LHI. Bedaŭrinde pro ekonomiaj per-

turboj unu jaron poste tiuj taskoj estis dividitaj inter diversaj ministrejoj. La disorganizado daŭranta du kaj duon-jarojn tre malfavoris la evoluon de la akvomastrumado. Ĉar la taskoj apartenis al nau ministrejoj, malebligis la unueco aŭ kunordigita evoluigo de la akvomastrumado. Preskaŭ anarkiaj cirkonstancoj karakterizis la situacion. Fine, en 1953 registara dekreto kreis la *„Landa Hidrologia Ĝeneraldirekcio"*-n, kaj per tio denove komenciĝis nova etapo en la akvomastrumado de Hungario.

La vojon trapasitan de tiam markas gravaj sukcesoj, kiel la akvonodo ĉe *Tiszalök*, sukcesa ŝirmado kontraŭ inundoj de Danubo (1954, -56, -65), Tiso (1970), konstruado de akvorezervujoj *(Rakaca, Lázbérc, Köszörűvölgy,* kaj multaj aliaj), disvastigo de irigacio sur duonmilionon da hektaroj, kreo de unuecaj Akvodukto kaj Kanalizacio Entreprenoj, de akva konstru-industrio, ampleksigo de maŝinizado, ktp.

La Parlamento en 1964 kreis la leĝon pri hidrologiaj aferoj, reguligante tiun aktivadon kaj la rilatojn kun la socio.

Dum tiuj jaroj formiĝis la movado de kompanioj kaj la labordivido inter taskoj de la ŝtato kaj de la konsilioj. De 1968 laŭ registara dekreto la akvoekonomio estas memstara popolekonomia branĉo, kun direkta rajto kaj respondeco pri la tuta akvomastrumado, senkonsidere de tio, ke la aktivadon kiu organizo kaj sub kies aŭspicio plenumas.

Tiu dekreto donis grandajn eblecojn, sed ankaŭ gravajn taskojn, ĉar la agado etendiĝis je ĉiaj akvaj servoj en la tuta lando. Krom la tradiciaj taskoj – lukto kontraŭ inundoj kaj grundakvoj, riverreguligoj, akvorezervujoj kaj irigaciado – ŝanĝiĝis la internaj proporcioj en la akvomastrumado. Superregas la akvoprovizado kaj kanalizado por la loĝantaro kaj industrio, la poluakvo-purigo kaj la ŝirmado de akvokvalito. Elstara afero estis la akvonodo de *Kisköre*, plej granda hidrologia konstruaĵo de la lando.



Primara sedimentigejo de poluakvopurigejo en Ózd

Ĉefaj trajtoj de la moderna akvomastrumado

Pro la socia-ekonomia evoluo, la kultura kaj teknika nivelo ade kreskas la akvobezonoj, aliflanke la kreskanta polucio malhelpas la pluajn uz-eblecojn de la akvo, sekve malpliigas la utiligeblan akvostokon. La limigita kvanto de naturaj akvoj, ties loke kaj tempe neegalaj trovebleco kaŭzas, ke daŭre kreskas la streĉiteco inter la be-

Poluakvopurigejo ĉe Vác





Konstruado de poluakvopurigejo en Ajka

zonataj kaj la utiligeblaj akvostokoj, kio imperative preskribas laŭplanan mastrumadon. Kompreneble paralele kreskas graveco de la ŝirmado kontraŭ akvodamaĝoj, ĉar plimultiĝis ankaŭ la minacataj valoroj. En Hungario, same en la tuta mondo, iĝis pli kaj pli urĝa la elformado de perfekta organizo por la produkta, priserva kaj ŝirmada akvo-agadoj.

Tio evidentigis la neceson de memstara ŝtata organizo, kies karakterizaj trajtoj estas:

– la produkto de sia agado, la akvo estas uzata grandparte kiel materialo, sed parte por persona konsumo,
– per sia laboro ĝi partoprenas rekte aŭ nerekte en la socia produktado kaj kontribuas al la nacia enspezo,
– ĝi funkcias kunordige inter ĉiuj ekonomiaj branĉoj, rilate la akvomastrumadon, kio ja estas baza kondiĉo de akvoekonomio en sociaj dimensioj.

Nuntempe la akvoekonomio jam per komplika maniero kaj tre vaste koneksiĝas al diversaj ekonomiaj branĉoj en intereso de la produktado kaj loĝloko-politiko. Ĝia efiko disvastiĝas sur grandaj teritorioj, eĉ en kelkaj kazoj – surbaze de internaciaj konvencioj – ekster la landlimoj. Kreiĝas reguligitaj rilatoj inter la akvomastrumado de entreprenoj kaj de ties regionoj.

El la supraj montriĝas, ke la moderna akvomastrumado esploras la akvoaferojn ne nur lige kun la naturo kaj kun la procedoj transformantaj la naturajn hidrologiajn cirkonstancojn, sed ankaŭ lige kun la reciprokaj efikoj de la socia-ekonomia medio. Ĝi ne limiĝas sole je prevento de akvaj damaĝoj, nek je ekspluato de la akvo, kiel naturdonita energi-fonto, sed ĝi klopodas reguligi la naturajn akvo-cirkonstancojn per kompleksa maniero: la surteran fluon de la akvo ĝi malrapidigas aŭ akcelas, dume laŭsezone retenas, plurfoje utiligas, ĝiajn materiajn kvalitojn transformas.

Grava pretendo estas rilate la akvomastrumadon: ĝi intervenu en la vivon de akvoj tiel, ke ĝia agado respondu al la postuloj de la socia-ekonomia evoluo, akcelu prosperon de la popolekonomio sisteme – kaj samtempe estu en harmonio kun la natura medio, ŝirmante la akvo-trezoron.

Tiu „entrudigo" en la vivon de la akvoj, se tio estas laŭplana, laŭcela, estas realigebla paralele kun evoluo de la scienco kaj tekniko pli kaj pli altnivele. Ties klarigo estas, ke la scienca-teknika prospero pli kaj pli malfermas la ekkoneblecojn de la naturaj fenomenoj koneksaj kun akvoj. Aliparte ĝi donas en niajn manojn tiujn perfektigitajn akvokonstruajn, akvomaŝinarajn, kemi-teknologiajn rimedojn kaj procedojn, per kies helpo oni povas studi kaj reguligi la fluo-cirkonstancojn de surteraj kaj subgrundaj akvoj, eĉ transformi ties materialajn ecojn. Oni povas ekspluati la akvotrezoron sin kaŝantan profunde sub tero, kaj oni povas „fabriki" akvon taŭgan por uzado el kvalite malboniginta.

La teknika evoluo ebligas influi la ekvilibron inter akvostoko kaj akvobezono laŭnecese, ja oni povas ripete uzi la akvojn kaj zorgi, ke laŭeble malgrandiĝu la akvoperdoj.

Mastrumado per la akvostoko

Fundamenta kondiĉo de la menciita evoluo estis prizorgi pri konvena akvo-bazo. Nome cirkaŭ 1954 en Hungario la kvanto de necesa akvo estis nur unu miliardo da m³ en unu jaro, nuntempe jam sep miliardoj, kaj en la sekvaj 10-15 jaroj la bezono estos 13-14 miliardoj, sed ĉe la jaro dumila jam 20 miliardoj m³. Tiu saltmaniera kresko de akvobezonoj faris klara tion, ke la ekvilibro inter bezono kaj naturaj kondiĉoj ne estas efektivigebla sole per lokaj partikularaj intervenoj. Solvi la streĉitecon eblas sole per kompleksa reguligo de akvocirkonstancoj

Akvoŝveliga digo ĉe Békés



Akvoelprena flosanta konstruaĵo de kapacito 2 m^3/ sek ĉe Rákócziujfalu

de grandaj teritorioj, tutaj akvokolektejoj – per transformado de akvofluoj, per pli ŝparema akvouzo.

Dum la lastaj tri jardekoj jam en tiu koncepto estis konstruitaj la akvonodoj *Tiszalök* (1954), – *Kisköre* (1973), la novaj artefaritaj „riveroj": Orienta kaj Okcidenta ĉefkanaloj, ŝveligaj konstruaĵoj de riveroj *Körös*. Grandparte en la lastaj 20 jaroj pretiĝis 300 akvorezervujoj, parte kun valfermaj digoj, parte sur ebenaĵo. Se la rezervujo de Kisköre plene estos elkonstruita, niaj rezervujoj rezervos unu miliardon da m^3, kiu estas duono de akvovolumeno de lago Balatono, la plej granda lago de Mezeŭropo. La tiel akumulita akvoamaso estas nemalhavebla bazo de akvoprovizo por loĝlokoj, industrio kaj irigaciado.

Multfaceta utilo de la akvorezervujoj estas krome malpliigo de inundodanĝero, riverreguligo, evoluigo de akvovojoj kaj kelkloke produktado de elektra energio. Koneksiĝas al tiuj, ke parto de tiuj rezervujoj – favore influantaj la aspekton de siaj regionoj – servas ankaŭ por ripozo, refreŝiĝo, sporto, turismo.

Protektado de akvokvalito

Kune kun la granda evoluo de nia industrio, pliigo de urbanizado, pro la impeta uzado de kemiaĵoj en la agrikulturo – paralele kreskas la danĝero de akvopolucio. En Hungario estiĝas el la ĉiujare utiligitaj 7 miliardoj m^3 da akvo proksimume 2 miliardoj m^3 da poluakvo.

Ĉi tio faras komprenebla, ke en nia lando por mediŝirmado unuavice en la akvoekonomio okazis kompleksaj, efikaj disponoj. La juraj, administraj, teknikaj, ekonomiaj reguligaj sistemoj por la akvokvalit-protektado formas kompleksan sistemaron. La rezultojn de akvoprotektado oni sukcesis atingi ne sole – eĉ ne ĉefe – per registaraj aŭ magistrataj rimedoj, – sed per pozitivaj, progresigaj disponadoj. *En Hungario jam de dekkvin jaroj okazas sistema kaj organizita akvokvalit-ŝirmado.* La hidrologia organizaĵo – krom la kontinua kontrolado en reto de laboratorioj – partoprenas la prilaboradon de akvoprotektaj teknologioj, helpas krei industrion por akvoŝirmado, fabrikadon de poluakvo-purigaj instalaĵoj.

Okaze de abruptaj, katastrofaj akvopolucioj, kiaj en la lastaj jaroj prezentis sin, ebliĝis rapida mobilizado, efika prevento, apogiĝante sur moderna ŝirmad-organizaĵo.

Apud la organiza kaj teknika preteco, pluaj rimedoj de la protektado estis ankaŭ la akvojuraj reguloj, kiuj jam de jardeko deklaras: akvon poluanta uzino ne estas konstruebla sen akvopurigaj instalaĵoj. Se iu nova aŭ malnova fabriko, bieno tamen poluas la akvon, tiu devas pagi poluad-punon. Se malgraŭ la punpago ĝi ne efektivigas efikajn disponojn por akvoŝirmado, la sumo de monpago pojare progresive grandiĝas, kio povas malfavore influi la financojn de la entrepreno. Hodiaŭ jam estas

Akvonodo ĉe Kisköre





Konstruata akvorezervujo sur monto Gellért en Budapeŝto

pli favora por la entreprenoj, se ili investas kaj efike funkciigas siajn purigajn instalaĵojn, ol pagas la punkotizojn. Cetere la punpago ne estas memcela sankcio. El la sumoj pagitaj pro poluo ricevas subtenon entreprenoj, kiuj ankaŭ mem elspezas konformajn sumojn por akvoprotektado.

Perspektiva evoluigo de akvomastrumado

Pro la akceliĝanta socia-ekonomia prospero ĉiam grandiĝas la bezonoj por akvo, kiujn la hidrologio devas kontentigi, kaj samtempe pliigi la sekurecon kontraŭ akvodamaĝoj. Kun la ekonomia evoluo kreskas ankaŭ la bezono de la socio por infrastruktura provizado.

Tiu ĉi tutmonde validiĝanta postulaĵo – pro niaj limigitaj, en spaco kaj tempo ekstreme ŝanĝiĝantaj akvostokoj – kreas kontraŭdirojn, kiujn oni povas forigi nur per daŭre kreskantaj spezoj, per pli granda organiziteco, kaj per teknike pli altnivela kompleksa interveno.

La industria produktado antaŭvideble triobliĝos ĝis 1950 – kompare kun la 1975-jara – kaj la dinamika evoluo estas atendebla ĝuste en la akvon plej bezonantaj branĉoj: kemia, elektra kaj nutraĵ-industrioj.

La evoluo de agrikultura produktado akceliĝos, kaj ŝanĝiĝos ties teknologio, la industrieca produktado îgos ĝenerala. Venos signifaj ŝanĝoj en konsisto de la vilaĝa loĝantaro, kaj la bezonoj por akvoprovizo estos identaj kun tiu de la urbanaro.

Malgraŭ la malpliigo de kulturitaj areoj, la produktado estos pli grandkvanta kaj bonkvalita. Specialan atenton oni devas dediĉi al ŝanĝoj kaŭzotaj far la forta evoluo de la industrieca bredado. Ĉiuj ĉi alportos gravajn ŝanĝojn en la agrikultura akvouzado, precipe kvantan altigon.

Specialan sekvon havas la elformiĝo de somerumejoj, ripozlokoj pro la pli longaj libertempo kaj ferioj. Tio signifas koncerne la evoluigon de akvoprovizado kaj kanalizado tion, ke oni devas zorgi por grava parto de la loĝantaro pri duobla provizo!

La valoro de la naciaj havaĵoj sur teritorioj minacataj de inundoj nuntempe superas la 450 miliardojn da forintoj kaj ĝi kreskas rapide. Tiu fakto postulas krei teknike konvenan sekurecon, rapidan ekfunkciadon okaze de danĝero, kaj anticipadon de la akvokvalit-malboniĝo.

La protektado de akvokvalito estas baza kondiĉo ankaŭ por aliaj akvoekonomiaj taskoj, kaj unu el la plej gravaj faktoroj de la medioprotektado.

Enflueja konstruaĵo de kanalo Sió en Siófok (ĉe lago Balatono)



Laŭ kalkuloj, la industria akvobezono kreskos de la nunaj 2,3 miliardoj da m^3 jare je 9-10 miliardoj m^3, tio estas pr. 80% de la tuta akvobezono de la lando.

Por kontentigi tiujn postulojn estos necesa, krom la fortostreĉoj de la hidrologiaj laboruloj, vasta socia-ekonomia kunlaboro en ĉiu sfero de la lando.

Ĉefaj taskoj en la perspektiva evoluigo de akvoekonomio

Ĉefa tasko restos plue la akvoprovizado kaj kanalizado de loĝlokoj. En la periodo ĝis 1990 oni grandparte konstruos, laŭ necesa amplekso, la akvokonsumon ebligantajn lokajn kaj regionajn akvoprovizejojn. Kun la kresko de akvouzado, en tiu etapo la „pezocentro" estos la ŝirmado de akvokvalito. Paralele pliiĝos la neceso por akvoprovizaj kaj akvoduktaj instalaĵoj, ebligantaj transmeti siatempe la akvokvantojn aliloken.

Pro la limigita kvanto de la akvo, oni devas dediĉi pli da atento por akvoŝparaj teknologioj ĉe la industrio, ekzemple per enkonduko de akvoreturnigo, akvorefreŝigo.

Taskoj de akvokvalito-ŝirmado

La akvobezonoj estas kontentigeblaj nur el tia akvo, kiu havas kvaliton konvenan por ĝia uzado. Tial estas kompreneble, ke la akvokvanto-mastrumado estas nedisigebla de la akvokvalito-mastrumado. La moderna akvokvalito-mastrumado okupiĝas, krom purigado de poluakvoj, pri plibonigo de akvokvalito per alkondukado, per aldono de dilua akvo, kaj pri aliaj solvoj konvenaj.

La ŝirmado de akvokvalito – adaptiĝante al la medioprotektado – fariĝas socia zorgo. Tio igas necesa la intensivan evoluigon de la akvokvalit-ŝirmado, de la kapacitoj, de la teknika preteco, krome necesas kompleksaj disponoj por ĉiurilata protektado de la akvoj kaj de la medio.

Tr. A.Pechan

La novkonstruita kluzo „Kvassay„ ĉe Danubbranĉo sude de Budapeŝto



La sangokolora maro

Li elmontris la novan ekspozicion sub la titolo "La sangokolora maro". La vero estis ke jam de la frua infanaĝo la maro lin allogis kaj fascinis. Ankaŭ jam de la frua knabaĝo li sentis ke en li mem troviĝas la maltrankvilo simila al tiu de la malkvieta maro kiam la ondoj impetas kontraŭ la bordo. Li estis filo de fiŝkaptisto kaj la familio vivis en la mara proksimo.

Sed la adjektivo sangokolora havis neniun rilaton al lia entuziasmo por la mara beleco.

En la tempo de lia knabaĝo el la proksima urbeto iun tagon venis pentristo. Li serĉis knabon, pretan helpi al li, porti la necesan ilaron kaj esti ĉemane. La pentristo renkontis Ivan ie apud la marbordo, kie li sidis solece kaj enpense. La pentristo montris intereson por liaj rektaj kaj senperaj reagoj. Ivan scipovis, en sia speciala maniero, fulmorapide respondadi al la faritaj demandoj.

„Ŝajnas ke la soleco konvenas al vi. Kion vi faras tie ĉi kaj pri kio vi cerbumas? "

„Mia patro ofte diras ke mi estas sovaĝa kiel la ventego kiu maltrankviligas la maron."

„Kaj kion vi pri tio opinias? "

„Mi ne povas al tio respondi. Mi preferas sidi apud la malkvieta maro ĉar ĝi trankviligas min kaj forprenas ŝtormon kiu regas en mi mem."

„Mi estas pentristo kaj intencas pentri kelkajn motivojn pri la maro kaj ĝia ĉirkaŭaĵo. Mi bezonas helpanton. Ĉu vi eble volas helpi min? "

„Tre volonte. Mi havas sufiĉan tempon. Neniam antaŭe mi renkontis pentriston. Kaj krome mi ĉiam deziras travivi ion novan kaj nekonatan."

Kaj dum la pentristo pentris diversajn motivojn, Ivan sidis apud li preskaŭ narkotita de tio kion li vidis sur la granda papero. La konturoj de la pejzaĝo kiujn li observas per propraj okuloj, troviĝas sur la papero kiel ĝemeloj de la vera naturo. Nur la koloroj ne estas tute la samaj. Tiuj sur la papero estas tro ardaj. Sed li ne demandas pri tio. Li nur sidas kaj senvorte gapas al la papero sentante ke li malkovris iun novan mondon en si mem kaj en la naturo lin ĉirkaŭanta. Kaj subite kiel fulmo el la klara ĉielo alvenis en lian kapon la ideo. Fariĝi pentristo! Ĉu ĝi estas nur fikcio kiu restos nerealigebla? Ĉu li, efektive, posedas la necesan naturtalenton kiu estas nepre bezonata por vivteni sin kiel pentristo? La patro, kompreneble, konsideris, ke li daŭrigos la familian tradicion.

Sed okazis ke la pentristo ekamis lin kaj, ĉar li estis solulo, proponis al li, antaŭ la foriro, ke post la fino de la elementa lernejo li venu en la urbon por frekventi mezlernejon. En lia loĝejo sufiĉas loko por la knabo kaj, memkompreneble, li kovros ĉiujn elspezojn.

„Mi ne scias, ĉu mia patro konsentos pri tio. Lia volo estas ke mi fariĝu fiŝisto laŭ la familia tradicio.

„Mi ne kredas ke li rifuzos mian proponon. Kiam vi akiros studentan ekzamenon, vi povos elekti tiun metion, se vi volas. Vi estas talenta knabo kaj viajn, de nature hereditajn kapablojn vi nepre devas flegi."

Kaj tiel estis. La patro estis saĝa homo, kiu komprenis la gravecon de la vortoj kiujn al li prezentis la pentristo.

Ivan ne tuj malkovris al la pentristo sian deziron. Sed iun tagon, en kiu li, kiel kutime, estis ĉemane en la ateliero, la nepre volis diri al la pentristo tion kion otte esprimis la instruisto de desegnado, nome, ke li posedas interesan naturtalenton.

La pentristo faris neniun rimarkon, sed petis al Ivan, ke li desegnu kelkajn objektojn. Kaj tiel la talento de Ivan estis malkovrita. La pentristo donis al Ivan necesan instruon, sed nepre insistis ke li unue finu la gimnaziajn studojn kaj poste frekventu la Artan Akademion. La pentristo intencis subteni lin ankaŭ dum la edukado en la granda urbo.

La patro de Ivan estis en dubo koncerne la pentristan metion, sed ne kontraŭstaris al la propono. Li ja nenion devis elspezi.

Ivan finis la Akademian frekventadon kaj farigis sukcesa kaj fama pentristo eĉ eksterlande. Li edziĝis kaj patrigis. La sukcesplenaj kaj senzorgaj jaroj pasis laborplene kaj kontentige.

Sed subite kaj neatendite li eksentis, ke la vivo haltis ĉe la rando de seninteresiĝo kaj enuo. Ŝajnis ke la fonto de inspiro sekiĝis. La stagnado komencis lin sufoki. Li sentis ke ne plu li povas krei ion novan, grandiozan kaj sensacian.

En tiu senespera situacio li ekdeziris ĉion forlasi, la familion, la medion kaj la sukcesojn. Li trovis neniun alian eliron ol reveni en sian naskiĝlokon kaj tie ĉerpi novajn inspirojn.

Neniu protestis. Kiom longe li restu for, pri tio li ne cerbumis. Li nur volis forlasi la ĉiutagan vivon.

Sidante apud la maro sur la grandega stona plataĵo, li rememoris la foran tempon de sia knabaĝo kaj eksentis ke tie ĉi li trovos la novan fonton de inspiro.

Li skizis la tutan planon. Li pentros nur la maron. Dum ĉiuj sezonoj, dum pluvvetero, ŝtormo kaj dum sunaj tagoj.

Lia frato posedis teran areon 5 km-ojn for de la vilaĝo. La tero estis ŝtona kaj inter ŝtoneroj kaj ŝtonoj kreskis figarboj, olivarboj kaj diversaj mediteraneaj arboj. La frato konstruis dometon por li. Ĝia muro flanke de la maro estis farita el vitro.

La frato zorgis pri tio ke li havu ĉemane ĉion necesan, sed pretigi la simplan manĝaĵon Ivan nepre volis propramane. Fojefoje venadis la bofratino, por purigi la dometon aŭ alporti preparitan manĝaĵon.

Tre malofte la dometon preterpasis vilaĝanoj venintaj por kontroli kiel statas iliaj malproksimaj terareoj. Ili eĉ ne demandis por kio servas ĉi dometo staranta izole kaj fore de la vilaĝo. Verŝajne ili havis siajn proprajn zorgojn kaj ne donis la atenton al pentristo, al sinjoro el la granda urbo, kiu devas ion fari por pasigi la tempon.

Estis frua printempo, kiam li alvenis. En tiu izola loko li fine sentis sin feliĉa, ĉar en lia interno denove bolis la inspiro necesa por majstra kreado.

Antaŭ li sterniĝis la senfina maro kiu ludis kun siaj ondoj kiel kapricoplena virino. La maro alternis: ĝi kviete ripozis, bruegis kaj muĝis aŭ surfade salutis la pentriston ĵetante sian akvon eĉ ĝis la vitra muro. La maro ekspoziciis sian riĉecon de senfinaj detalaĵoj neniam same aspektintaj.

Matene je sunleviĝo transverŝinte siajn radiojn la maron salutis la suno, tagmeze la maro ĝemis sub la arda suno kaj je sunsubiro ĝiaj lastaj radioj irize reflektoris la kvietan surfacon de la maro.

Dum ventegoj la maro ricevis aspekton de danĝeraj nimfoj kaj la sovaĝa beleco de la ŝaŭmanta kaj blanka mara sango orgiis en la interno de Ivan dum sur la paletro pasioplene miksiĝis la farboj.

Li ekhavis fortan dezíron ĉirkaŭbraki ĉi maron, la fonton de novaj kaj freŝaj inspiroj. Ĝi fariĝis bonintenca fantomo kiu hantis lian fantazion. Li preskaŭ enamiĝis al ĝi kaj nur bedaŭris ke li ne posedas la talenton de poeto por eternigi ĝian belecon ankaŭ per vortaj esprimoj.

Preskaŭ nerimarkite pasis la printempo kaj la naturo eniris la someran sezonon. Ĉiu tago alportis al li ĉiam novajn inspirojn de sur la maro alterne ŝanĝanta.

Sed iun tagon ŝi subite aperis. De kie ŝi venis kaj kiam ŝi venis? Pri tio li ne sciis. Kvazaŭ sonĝe li ekvidis ŝin kuŝi nuda sur la ŝtona platafo. Lin trafis kolero pro ŝia aroganteco konkuri kontraŭ la grandioza maro per sia korpa beleco.

Sed iom post iom lin trankviligis la perfekta simetrio de ŝia korpo. Ŝajnis ke ĉi Venera beleco akordiĝas kun la simetrio de de la maro. Fine ŝi kaj la maro harmoniis en akordo kun la naturo kaj kun li mem.

Ŝia tuta korpo vibris sub la sunradioj en nepriskribeble erotika maniero. Kun la sama strečiteco, kun kiu li antaŭe desegnis la maron, li nun skizis la sveltan korpon, kiu ŝajnis esti pli svelta kaj pli erota sur la pentrista papero, desur kiu jam brilis la maro eliginte sian propran ĉarmon kaj subliman kvieton.

La saman tagon, nur kelkajn horojn post ŝia apero, alvenis la junulo. Ivan vidis lin elboatiĝi. Ŝi kvazaŭ nenion rimarkis kaj restis senmova eĉ dum la junulo staris apud ŝi kaj senvestiĝis. Nek kiam li ekkuŝis kaj intime sin alligis al ŝia sune varmigita korpo. Pro ĝojo vibris iliaj sopiroj kaj flugis super la akvo kiel enamiĝintaj mevoj. La brakume kunigitaj korpoj harmonie kunligiĝis kaj la spontaneaj kaj pasiaj ĝojkrioj etendiĝis ĝis la oreloj de Ivan, ŝirante ĝiajn membranojn kaj ekscitante lian sangon. La eligitaj sonoj ŝaŭmis senbride kaj perforte kun la ritmo simila al la malkvieta maro.

Kaj li tute forgesis sian intencon pentri nur la maron. Kun ia sovaĝa entuziasmo li ĵetis sin en la pentradon por skizi eĉ la plej sensignifan detalon de ilia amludo: lia rapideco estis tiu de kuristo kiu nepre devas unua atingi la celon.

Kiom longe daŭris ĉi amludo? Eble kelkajn horojn, eble la tutan antaŭtagmezon. Nek por li nek por la enamiĝinta paro ekzotikajn dancojn.

Observinte ĉi unikan amludon kiun eĉ la plej riĉa fantazio ne povus elpensi, li komencis ĝin kompari kun tiu kiu estis priskribita de jarcentaj verkistoj kaj poetoj. Pri amludo oni komponis muzikafojn, pri ĝi oni kantis, aktoris, diskutis kaj disputis. Nun ŝajnas al li ke ĉio antaŭe prezentita estas nereala kompare kun ĉi impresionismafo staranta antaŭ liaj okuloj. Mia Dio, li pensis, en lia propra edzeco okazis nur simplaj kaj senekscitaj scenoj.

Kaj nun, kiel Dia atestanto, li observas la maldiskretan amludon sentante kvazaŭ li mem kun sia propra nudeco en ĝi partoprenas kaj eĉ sin kontentigas per samaj pasioj..

Ili sin kisadis kaj stimulis la erotogenajn centrojn. La ritma uragano ventokirlis sur la ŝtona platafo dum la sensa plezurego bolis en la vejnoj de Ivan kvazaŭ vulkana erupcio de seksa impulso. Muskoloj de la junulo strečiĝis atletoforte kaj la krioj de plezurego ekstaze frapegis sur la timpanojn de Ivan. Ŝi fleksiĝadis sub la fortaj brakumoj de la junulo kiel serpento kiu pasie siblas sub la transverŝitaj sunradioj lekantaj ĝiajn skvamojn.

Subite trankviliĝis ĉiuj movoj. Ili restis kisantaj kaj kunligitaj tiel ke ili kvazaŭ formis unu solan korpon. Ivan sentis ke ankaŭ li kune kun ili kvietiĝas kaj ankaŭ lia bolanta sango, kiu surfis en la korpo kiel maraj ondoj dum uragano kaj tempesto.

Senadiaŭe kaj senbrue la junulo enboatiĝis kaj malaperis. Ivan ne vidis ŝian boaton, sed post kelka tempo kiam ŝi estis foririnta, li vidis alian boaton en la foro kaj en kiu distingiĝis ŝia figuro.

Ĉio tio ripetiĝis en la venonta kaj en la ceteraj tagoj kun la ekzakta precizeco de la tempo kaj kun la preskaŭ samaj variadoj de la amludo. La maro ne plu estis objekto de la pentrísta atento. Li estis tiom narkotita de ĉi amludo ke li kelkfoje venis en la staton de profunda timo ke ĉiuj mensaj kapabloj estas malaperontaj.

Kvankam la tuta evento ŝajnis esti ĉiam la sama, la amludo kaj la eleganteco de iliaj movoj, tamen li ĉiam eltrovis ion novan kaj pli ekscitan. Li skizadis la samajn detalojn kvazaŭ ili ĉiam estis novaspektaj kaj kun pli kaj pli granda fervoro li sekvis iliajn aminspirojn.

La amludo enscenigis prezentadon al la nudigita naturo en kiu dominis la maro, kaj al la pentristo, kiu frenezoobstine skizadis la kontinuajn scenojn. La maro balancetis siajn ondojn kun la harmonia ritmo de iliaj korpoj, kaj per la ŝaŭmanta akvo surfadis la fonon de la ŝtona platafo por refreŝigi la varman homan sangon per sia freŝa spiro.

Ŝajnis ke ĉi avantaĝo estis Dia bonfaro: kvazaŭ ili estis karese ĵetitaj en la liberon de la nudigita naturo, kie senkomplekse kaj forte odoras ritma ŝvito de volupta vibrado kaj kie la emfazaj krioj hurlas kiel la malkvieta maro.

Tiaj pensoj vagadis en lia cerbo dum li senĉese kaj senripoze skizadis la scenojn en la stato de totala forgeso pri ĉio kio ekzistis trans la limo de la stona platafo.

La amludo daŭris la tutan semajnon. La venontan tagon kiam ili estis atingontaj la kulminon de la orgasmo, Ivan aŭdis subitajn pafojn. Neniun li vidis. Sed iu staris malantaŭ la ŝtona muro kiu ĉirkaŭis la teran areon.

La krioj de volupto miksiĝis kune kun la agoniaj kaj la korpo de la junulo falis sur la ŝian. Ambaŭ korpoj restis senmovaj. La sango gutis sur la ŝtonan platafon kaj el la sanga flako guto post guto ŝvebglitis en la maron. Ŝajnis kvazaŭ sangas la tuta surfaco de la maro.

La pentristo ne plu atentis la mortintojn. Per furiozaj movoj li miksis farbojn sur la paletro por ke la koloro de la sangita maro estu identa kun la natura.

Regis plena silento. Kvazaŭ la naturo mem funebris pri la geamantoj, kiuj restis kuŝantaj en la marĉeto de sia propra sango, daŭre gutanta facile moveblajn sangerojn en la maron. La ruĝa marŝaŭmo anoncis al la tuta naturo ke la amludo estas mortinta.

Ivan pentradis kaj pentradis senhalte. Per iu mania obstino li eternigis la bildojn de la sange ploranta maro, sentante, ke li baldaŭ perdos la prudenton.

La korpoj estis forprenitaj, sed Ivan daŭrigis pentri la forlasitan kaj sange kolorigitan ŝtonan platafon kaj la ruĝan marŝaŭmon, kiu ekaspektis, naturkolora.

Ankaŭ lia intenco resti tie ĉi dum la tuta aŭtuno kaj vintro estis mortinta. Ivan revenis en la grandan urbon, ĉar li konsciis ke ne plu li povus elteni la solecon, postlasitan de la murdita amludo.

Ivan aranĝis la ekspozicion kun la titolo „La sangokolora maro".

Vizitantoj amase venadis kaj gapante admiris la pentrafojn, de sur kiuj kvazaŭ gutis la sanga maro. Ili ne povis kompreni la kaŭzon de sia propra freneza ekscitiĝo, sed ĝuste tian impreson postlasis la ekspozicio.

Kritikistoj skribis pri granda pentristo, kiu per la nova ekzpozicio montris nekonatajn flankojn de siaj artistaj forto kaj talento. Liaj sukcesoj ripetiĝis ankaŭ tra la tuta mondo.

Neniu inter la tutmondaj vizitintoj nek la kritikistoj divenis de kie li ĉerpis la inspiron.

Malantaŭ la monstre mirigaj maraj pentrafoj sin kaŝis forto de aŭtentika prahoma instinkto kaj venĝoplena fato de murdisto.



Atestaĵo pri granda laboro

ESPERANTOLOGIAJ KAJEROJ 2. Redaktita de Zsuzsanna Varga-Haszonits. Universitato Eötvös Loránd, Budapest, 1977. 273 p. Prezo: 16,50 ned. gld. (Por Hungario 35,– Ft.)

Eldonita okaze de la dekjara jubileo de la Esperanto-fako en la Budapeŝta Universitato Eötvös Loránd (gvidata de István *Szerdahelyi*), tiu ĉi volumo estas plia kontribuo de la plej grava el niaj universitataj Esperanto-fakoj al interlingvistiko kaj esperantologio. Ĝi enhavas artikolojn pri gramatiko, literaturo, metodologio kaj interlingvistiko, verkitajn de diplomitoj de la Budapeŝta Esperanto-fako, de hungaraj lingvistoj kaj de diverslandaj esperantologoj kaj pedagogoj. Aldone trovigas ampleksa historio de la Esperanto-fako kun ties studprogramo – kiu atestas pri la altniveleco de la studoj – kaj listo de la verkoj de I. Szerdahelyi.

La partoj „Gramatiko" kaj „Interlingvistiko" estas la plej ampleksaj kaj plej interesaj. Dank' al traduko de ĉapitro el verko de János *Zsilka* („La dialektiko de la lingvaj movformoj"), studantoj de lingvoscienco povas konatiĝi kun la ĉefaj tendencoj en lingvistiko, de la novgramatika skolo ĝis la Hjelmsleva strukturismo (ĉu la termino *strukturalismo* vere necesas?), tra Saussure, Chomsky, Bloomfield kaj Tesnière / aparte bonvena estas la priskribo de la Tesniera teorio, tro otte ignorata). Sed certe plej interesos la esperantistojn la artikoloj dediĉitaj aŭ rilatantaj al Esperanto kaj/aŭ al la internacilingva problemo. Jerzy *Uŝpieński* en „Lingvaj obstakoj en la interpopola „komunikado" traktas temon tre ofte renkontatan en la esperantlingvaj eldonaĵoj, resumante la nunan situacion en malmultaj paĝoj kaj substrekante la gravecon de interlingvistiko en la hodiaŭa mondo.

Elstaran gravecon havas miaopinie la artiko de L. *Antal* „Kelkaj lingvistikaj problemoj rilate la artefaritajn lingvojn", en kiu la aŭtoro tre klare respondas al la tradicia demando: kial la lingvistoj plej ofte ne interesiĝas pri la artefaritaj lingvoj? L. Antal konvinke donas la respondon koncerne la novagramatikistan skolon – kies centra tezo estas la historieco – kaj la skolon fontantan el la Saussure-aj vidpunktoj, kiu privilegias la koncepton de lingvokomunumo kaj gepatra lingvo, ekstreme esprimitan en la teorio de Whorf. Por la unuaj kiel por la duaj, la artefaritaj lingvoj, senhistoriaj kaj neniesaj, ne estas konsiderendaj. La tuta afero povas ŝanĝiĝi kun la genera gramatiko, kiu asertas la universalecon de la profunda strukturo: la profunda strukturo de Esperanto estas ja „la sama kiel tiu de la naturaj lingvoj" kaj Zamenhof nur „aldonis novan surfacan strukturon al la komuna, por ĉiuj homoj valida profunda strukturo."

Tamen estas malfacile konsenti kun la aserto de la aŭturo, ke homoj parolantaj Esperanton kiel gepatran lingvon ne ekzistas (p. 207) – kaj tiu aserto falsas certagrade la tutan rezonadon.

En „Lingvistiko, interlingvistiko, esperantologio", A. *Bausani,* post historia panoramo de la artefaritaj lingvoj, en kiu li montras la parencecon inter la nunaj planlingvoj kaj la iamaj klopodoj krei lingvojn magiajn aŭ mistikajn, pritraktas denove la tipologion de Esperanto, kiu samtempe parencigas ĝin kun lingvoj ne-hindoeŭropaj kaj certigas al ĝi plejan memstarecon – kondiĉe, kompreneble, ke oni ne submetiĝu al la „Eŭropa dialekto", pri kiu prave parolis Claude Piron. Laŭ ekzemplo de Bausani, *tio ĉi indas* estas samtempe malpli eŭropeca kaj pli esperanteca ol *„oni devas fari tion"*.

La klarega kaj informorica artikolo de Humphrey *Tonkin* pri „Esperanto kiel objekto de universitata instruado kaj scienca esploro" skizas historion de la rilatoj inter la universitata mondo kaj Esperanto, karakterizas la nunan situacion („subtila reorientiĝo" de esperantologio ekster la verdan rondon) kaj indikas la mankojn: sociologio de la Esperanto-movado, historio de la literaturo, studoj pri la parolata lingvo (fonetiko, interferoj, lingvaĵo de la denaskaj esperantistoj) preskaŭ ne ekzistas. La taskoj difinitaj en la lasta ĉapitro estas certe ambiciaj, sed necesegaj.

Al la fonologia sistemo de Esperanto estas dediĉita artikolo de S. *Hukaya* kaj E. *Tálos,* kiuj, provante difini la nombron da fonemoj Esperantaj, denove stumblas ĉe la problemo de la afrikatoj, kaj konkludas, ke „Esperanto ne havas fonologian sistemon, sed nur grafeman sistemon". Tiu aserto veras diakrone, ĉar Esperanto efektive posedis alfabeton antaŭ ol esti parolata, sed ĉu ni rezignu pro tio ellabori fonologian priskribon de Esperanto? En la koncerna artikolo trovigas strangaĵoj: la aserto, ke *n* antaŭ *b/p* elparoliĝas kiel *m* (tiel neŭtraliĝus *manpremo* kaj *mampremo!*); la uzo de *morfofonemo* tie, kie temas pri arhifonemo (parenteze, mankas esperantlingva lingvistika terminaro!); la nekompreneblaj asertoj, ke „neniu parolas Esperanton kiel gepatran lingvon" kaj ke la ekzisto de denaskaj esperantistoj (do ili ekzistas!) estas kontraŭesperantisma (tiel!).

Nepre atentindaj estas la artikoloj de Helmar *Frank* kaj Peter *Zlatnar* pri pedagogiaj kaj didaktikaj problemoj, la terminologio de la programita instruado komplitita de J. *Balogh* surbaze de la angla, rusa kaj hungara terminologioj kaj la statistika komparo, far M. R. *Szabó,* de la vorttrezoro de la mezlernejaj lernolibroj por la dua lingvo. La projekcio de la rezultoj al Esperanto montras malpliiĝon de la lernendaj leksemoj, ŝulditan al la strukturaj ecoj de Esperanto.

Du studaĵoj estas dediĉitaj al literaturo. Komparante du tradukojn de Kalocsay por unu versaĵo de Petőfi, Katalin *Nagy* montras kiel Kalocsay plibonigis la metrikon per fonetikaj ŝanĝoj. Mária *Bereczki* provas analizi la verkon de Szathmári *Vojaĝo al Kazohinio.* La esenco de ĉi tiu elstara verko estas bone klarigita, sed mankas kritika analizo pri la ideoj de Szathmári: ĉu ekzistas nur du ebloj (la hina aŭ la behina vivo), ĉu la hina stato estas atingebla nur per biologia ŝanĝo, ĉu ĝi estas stato definitiva aŭ transira, kiel kongruas aŭ malkongruas la tezo de Szathmári kun la marksistaj konceptoj? Kiom valoras la aserto de M. Bereczki, ke „ĉe la hinoj ni renkontas la efektiviĝintan komunismon"? Rev-instiga estis la *Vojaĝo* dum la malluma periodo, en kiu ĝi aperis. Verŝajne Szathmári dirus, ke en 1978 nenio esence ŝanĝiĝis. Sed la utopia idearo de la lastaj dek jaroj ja ebligus remeditadon super tiu fama verko.

Bedaŭrindas ie-tie kelkaj malklaraĵoj, sintaksaj strangaĵoj kaj gramatikaj eraroj (ekzemple en la lasta paragrafo de la p. 203, sistemeca fuŝado de la akuzativo, p. 117, neglekto de la refleksivo), kiuj iom strangas en tiel altnivela libro.

recenzoj - recenzoj - recenzoj

Nepre pozitiva estas reekzameno de la fenomeno „Esperanto" – lingvo kaj movado – ekster la kadroj de la tradicia apologetiko. Tamen, estus dezirinde, ke la seriozaj esplorantoj sufiĉe intimiĝu kun la „verda popolo", sen kiu la lingvo ne ekzistus. Ĉar, kiam ordinara esperantisto legas, ke denaskaj esperantistoj ne ekzistas aŭ ke ankoraŭ solvendas la problemoj: „Ĉu fakte eblas artefarita lingvo?" „Ĉu ankaŭ Esperanto havas sian internan sistemon?", (p. 90) li supozeble konkludas, ke indas nur fosi sian sulkon kaj ne okupiĝi pri la cerbumaĵoj de la lingvistoj.

La ĝenerala konkludo tamen estas, ke tiu ĉi volumo, kiel la du antaŭaj, atestas pri la elstara loko okupita de la Budapeŝta Universitato sur la tereno de interlingvitiko kaj esperantologio kaj pri la grandega laboro farita de Prof. Szerdahelyi kaj liaj kolegoj kaj studentoj por ŝtopi la breĉojn, kiujn prave aludis H. Tonkin en sia artikolo. Tiaj verkoj meritus pli ol 500-ekzempleran eldonkvanton.

Michel *Duc Goninaz*

BILDRAKONTO – KUN PRESKAŬ 400 DESEGNAĴOJ – EN ESPERANTO!

Intereskapta kaj taŭga legaĵo por ĉiuj âgoj!
Ĝia agado disvolviĝas dum la jaroj 1848/49 en Aŭstrio kaj Hungario, kaj ĝi prezentas per la historio de nobela hungara familio mem la epokon.
La kovrilpaĝon ornamas kolorfoto!
64 p., 24 cm. Prezo: 6,- DM
Mendu ĉe:
CO de Universala Esperanto-Asocio (Rotterdam), aŭ rekte ĉe Hungara Esperanto-Asocio H-1368 Budapest, Pf. 193.

Por revendistoj 33 %-a rabato!

Eterne „verda" libro

EL LA „VERDA BIBLIO" *de I. Lejzerowicz. Eld. Hungara Esperanto-Asocio, 1978. 80 p. Prezo: 8, 10 ned. gld. (Por Hungario: 35, –Ft.)*

„Kaj la Spirito benis la sepan tagon kaj sanktigis ĝin, ĉar en ĝi Li ripozis legante la originalan literaturon, kiun Li faris kreante" – tiel finiĝas la Unua Ĉapitro de la verko far Izrael Lejzerowicz. La stilo, la esprimoj estas Bibliaj. Li elektis ja ĝuste tiun rimedon por fari satiron pri Esperantujo. Lia provo estis sukcesa, kaj EVB, aperinta en 1935 ĉe la eldonejo Literatura Mondo, multajn jarojn estis ŝatata legaĵo de pluraj esperantistoj. Depost la unua eldono de la verko pasis jam jardekoj, plejparto de la unuaj legantoj de tiu ĉi sprita libreto jam forpasis, la verkinto mem iĝis viktimo de nazifaŝismo.

Ĉu EVB eble perdis sian aktualecon? La Eldona Komitato de HEA opiniis male. Ankaŭ laŭ ili, kiel laŭ Lejzerowicz, *„kulturpopolo estas la verdularo"*, aŭ almenaŭ tiu ĝi devus esti. Al movadanoj utilas koni krom la vortoj kaj gramatiko Esperantaj (kvankam tio tute ne superfluas) ankaŭ la „verdan" kulturon kaj la historion de sia afero.

En la recenzata satiro la aŭtoro humure konatigas la legantojn kun la naskiĝo de Esperanto, kun la problemoj en la unuaj jardekoj de ĝia ekzisto, kiel ekzemple la Ido-skismo, la disputo inter progresemuloj kaj ortodoksuloj, la organizado de UEA, la kverelo inter UEA kaj Centra Oficejo kaj ilia kontrakto en Helsinki ktp. Lejzerowicz dume primokas multajn elstarajn figurojn de la Esperanta historio. La plej trafaj karikaturoj estas tiuj pri *Andreo Apud* (Ĉe), *Junio Pagi* (Julio Baghy) kaj *Kalsurmano Galošej* (Kolomano Kalocsay).

En la dua parto de la libro troveblas kvar -noveletoj sub la titolo „Babilado kun Horaĉo Serĉer". En ili figuras la malnova-maljuna movadulo, kiu pro la „ĉiutagaj devoj kaj zorgoj" ne ellernis Esperanton. Li tamen ĉiam havas „geniajn" ideojn por venkigi la aferon. Ĉu per organizado de amoj de la esperantistaro, ĉu per nazimaniera „revolucio", ĉu per . . . Se iu legos la libron, ekscios per kio krome.

Oni do dum amuza legado kulturiĝas pri kaj per Esperanto, kaj ne malgrave: povas ĝui libron verkitan en ne tro peza, sed bonega stilo.

Ĉi-lasta estas la ĉefa aktualeco de Lejzerowicz.

P. Rados

Valora poemaro

Johán Valano: Malmalice. Originalaj poemoj. Eld.: La Nuova Frontiera, Kuopio-Pisa, 1977. 59 p., 20 cm.

La „mistera" aŭtoro post brua sukceso de la romano *Ĉu vi kuiras ĉine?* nun aperas kiel poeto. Tio povus efiki strange – ja detektivromanistoj malofte verkas poemojn – se ne temis pri Valano. Por li la detektivromano certe estis nur kvazaŭ bravaĵo sporta: jen, mi kapablas bone fari ankaŭ tiajn ojn. Oni ne dubas, ke tiu ĉi poemaro estas en rilato nepre pli intima kun liaj personeco, pensoj kaj emocioj.

Tiu ĉi maldika libreto kunigas poezian produkton de jardekoj. La severeco ĉe la selektado – sendube Valano verkis ne nur tiom da poemoj – faras la kolekton svelta, senbalasta. Eĉ la junaĝaj poemoj – pro sia karaktero pli ŝvebaj kaj malpezaj ol la postaj produktoj – montriĝas skrupule ellaboritaj kaj diafane puraj.

La unua profunde impresa poemo por mi estis *La amuzisto de la reĝo*. La klaŭno amuzas aliajn homojn, sed, fininte sian „oficadon", li restas senkonsola:

kaj en la ardo de l' rigard'
ne brilas plu ĵo petola
malvarmas nur grizo malmola
kiel la ŝtalo de ponard'.

Poste sekvas dekkvino da poemoj *egale* profundaj kaj elegantaj. Valano tuŝas plejparte filozofiecajn kaj etikajn temojn, sed li ne hezitas priverki ankaŭ sociologiajn konkretaĵojn, kiel la sorton de „senprofesia" edzino *(Kaj tiel plu)*. Estus malfacile reliefigi, aŭ male, dekreti malpli sukcesa iun en tiuj verkoj. Eble la sola malvirto de la tuta poemaro estas ĝia troa tona kaj nivela homogeneco. La kelkfoje aperantan iom predikan tonon, feliĉe, ĉie subpremas la spontanea ironio de la poeto.

Apartan pritrakton meritus la sinteno de la poeto al la lingvo. Li evitas neologismojn kaj ĉiajn laboratori-odorajn solvojn. Lia lingvaĵo ĉiam surportas la stampon de la vivo, de la parolata Esperanto. Malofta fenomeno en nia poezio.

Resume: temas pri poemaro valora, kiu ĝojigas nin aparte, ja nia poezio nuntempe tre certe ne estas sur sia zenito.

V. Benczik

BELARTA ANTOLOGIO

Antaŭ kelkaj monatoj aperis ĉe Hungara Esperanto-Asocio la ampleksa antologio de la plej sukcesaj literaturaĵoj de Belartaj Konkursoj, kun titolo „25 jaroj". Humphrey Tonkin skribas en la enkonduko: „Nia mondo ne facile akceptas miraklojn. Ni havas grandan kaj gravan respondecon ne nur plifortigi nian kulturon por certigi la . . . (la daŭrigon vidu sub horizontala 3. kaj vertikala 1.!)" Krom la finaj vortoj de ĉi frazo ni kaŝis ankaŭ du titolojn sub horizontala 52. kaj vertikala 34. Ensendi sufiĉas nur tiujn ĝis la 31a de januaro 1979. Inter la solvintoj ni lotumos la antologion, pri kiu temas en nia nuna krucenigmo. (Adreso: Hungara Vivo, Budapest, Pf, 193, H–1368.)

HORIZONTALE: 1. Propra nomo (ml1.) 2. *La daŭrigo de la frazo de Tonkin* 15. Efektivigi (R) 16. oksigeno, nitrogeno kaj uranio 17. Nobla parto de la lakto (R) 18. Drinkinta tro multe 19. Aperi interne 21. Havi altan korpan temperaturon 22. Franca infanteriano en Nord-Afriko (R) 23. Kunliga fera trabo (R) 25. Rilata al malantaŭa parto de la kolo 26. Aŭtoj el Hispanio, Luksemburgio kaj Svedio 27. Facile impresebla viro 29. Malagrabla trudherbo sur grenkampoj, kun venenaj semoj (R) 30. Simbolisma dramo japana (R) 31. Alproksimiĝi (R) 32. Multekosta metalo 33. Iamaniere 35. Vi kaj mi kune 36. Vira nomo 38. Manĝebla rizomo de dioskoreo (R) 40. Slava virnomo (R) 42. Fluidaĵo, per kio oni skribas (R) 44. Pli ol sufiĉe 45. Varoj transportataj per ŝipo aŭ vagonoj (R) 47. Lulilo de floro 49. Maltimi, spiti 51. Pro ĝi estas malseka la buŝo (R) 52. *Titolo de poemo de Albert Samyn* 53. Arbo, per tranĉo en la trunkoŝelo oni ricevas manaon (R) 54. Ĝardena kreskaĵo, ĝia grajno estas manĝebla, krome oni ricevas opion el ĝi 55. Amasigo 56. Nesentema, indiferenta (R) 58. Stato de animo aŭ organismo, okazinta pro troa ŝarĝo (R) 59. Hindua sistemo de filozofia meditado 60. Numeralo 61. Konata mll. de armeo en Irlando 63. La sola filo de Sankta Stefano unua hungara reĝo 64. Emblemo ĉe kartludoj, elektita antaŭe por havi superecon super la aliaj emblemoj (R) 67. Stari tuj je ies dispono 69. Havi intiman rilaton kun iu (R) 71. Amaso 72. Interjekcio en la telefono 74. Faro 75. Ano de UEA (mll.) 76. Kolekto ekz. de dokumentoj (R) 78. Asocio por progresigi kaj defendi la interesojn de siaj anoj 81. Ŝian paron 82. Posteularo (–o) 84. Ŝirmata 85. La propra nomo de patro de Zamenhof 86. Urbo en Nederlando grava pro traktatoj en 1678–79 (E. formo, R.) 88. Moviĝi en la direkto, el kiu oni venis pli frue 89. Ankaŭ tia mezlernejo ekzistas 90. Skuno (R) 92. Aŭtoj el Rumanio, Grekio kaj Italio 93. Nun, ĝis noktomezo.

VERTIKALE: 1. *Daŭrigo de horizontala 2.* 2. Surtera nubo 3. Agas 4. ILIV 5. Ĝi apartenas al vi kaj mi 6. Arĝento 7. Instrumenta muzikaĵo 8. Tuto de ĉio ekzistanta (R) 9. Inklino al rapido 10. Komencu! 11. Svedaj, aŭstraj, francaj aŭtoj 12. Malsano de nazo (R) 13. Densa vaporo (R) 14. Hokon de ŝtelisto, per kio li malfermas serurojn 19. Erbio kaj nitrogeno 20. For de ĉi tie! 23. Nocio en la elektroniko (R) 24. Urbo en Irlando proksime al la oceano 27. Senakva (R) 28. OEN 31. Boligota 34. *Titolo de la novelo de Miyamoto masao el „25 jaroj".* 36. Venena 37. Malamiko de la ŝipistoj (R) 38. Moviĝi 39. Malaltigi la nombron de la armiloj kaj soldatoj 41. Subdivido de familio ĉe vegetaĵoj kaj animaloj 43. Li havas la plej grandan piramidon en Egiptujo (–o) 44. Verbo de sprono aŭ gitaro 46. Ĉiu kuras al la Oceano (R) 48. Unuo de elektra rezistanco 50. Vorteto antaŭ la nomo de italaj katolikaj monaĥoj 51. Sulfuro kaj arseno 56. AEO 57. Iridio kaj fosforo 60. Rilata al filozofia skolo fondita en Ateno ĉ. 308. aK. 62. Kompilanto de libro „Infanoj de l' atombombo" (Osada . . .) 65. Ŝatata besto en la cirkoj (R) 66. Ekzemple la kauzo de interkvereliĝo povas esti tia! 68. Mi -latine 70. Etosoj, atmosferoj 72. Vortspeco (R) 73. Ovoforma blovinstrumento (R) 75. La nombro de la steloj kaj aliaj nekalkuleblaj aferoj (R) 77. Fumotubo (R) 79. NOR 80. Aŭtoj el Aŭstrio, Tajlando kaj Italio 81. Mezepoka internacia lingvo (R) 83. Epiteto de fervojo 85. Mielakvo 87. Frosto (R) 89. Hungara fabriko de horloĝoj (MOM) 91. Tibor Déry 93. Hungara kaj Aŭstria aŭtoj.

SZABO Imre



La solvo de la krucenigmo aperinta en la ĉijara 2a numero de Hungara Vivo estas: „Bona kaporalo revas esti generalo." Libropremion gajnis: Atanas GAEV (Bulgario), Stanisław JANUSIEWICZ (Pollando) kaj KIS Ilona (Hungario). La libroj estas jam ekspediitaj.

KIE ABONI LA REVUON?

AUSTRIO: Rudolf Novák GmbH. Köllnerhofgasse 4. A–1011 Wien I.: □ AUSTRALIO: Globe Hungarian Bookshop 694–696 George St. Sydney, NSW 200; □ BRAZILO: Livraria D. Landy Ltda. Rua 7 de Abril, Caixa Postal 7943, 01000 Sao Paulo; □ BRITIO: The Danubius Book Company 58, Chatsworth Road, London NW2 4DD; □ DANLANDO: Hunnia Books and Music, Norrebrogade 182. I. tv, Kobenhavn; □ FINNLANDO: Akateeminen Kirjakauppa, Keskuskatu 2, SF–00100 Helsinki 10.; □ FRANCIO: Société Balaton, 12 Rue de la Grange Bataliere, Paris 9.; □ G.F.R.: Ujvári-Griff, 8000 München 81, Titurelstr. 2.; Harry Münchberg, Wissenschaftliche Versandbuchhandlung, Postfach 3394 Langelsheim 2.; □ ISRAELO: Publika biblioteko Hadash, Nesz Ciona u. 4. Tel Aviv; Gondos Sándor, Haifa, Herzl 10, Beth Hakranot; □ JUGOSLAVIO: Forum, Vojvode Misica broj 1. Novi Sad; □ KANADO: Délibáb Film and Record Studio, 19. Prince Arthur Street West, Montreal 130. Oue.; Pannonia Books, P.O.Box 1017, Postal Station „B", Toronto, Ont.; □ NEDERLANDO: Club Qualiton, Prinsenstraat 26, Amsterdam; □ SVEDIO: A.B. Nordiska Bokhandeln, Alströmergatan 22, 101 10 Stockholm 1.; □ SVISLANDO: Metropolitan Verlag, Szerday Sándor, Teichweg 16, CH–4142 Münchenstein; □ USONO: Center of Hungarian Literature, 4418–16 Ave, Brooklyn N.Y. 11204; Hungarian Books and Records, 11802 Buckeye Road, Cleveland, Ohio 44120; □ VENEZUELO: Luis Tarcsay, Calle Iglesia Ed. Villoria, Apt. 21–105. C. 24. Caracas.

Abonojn el ceteraj landoj akceptas kaj UEA (Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam 3002.); kaj KULTURA (Budapest, Pf. 149.1389.) – al la ĉekkonto 027 024/7, Hungara Nacia Banko, Budapest, 1850. En socialismaj landoj oni povas aboni la revuon ĉe ĉiuj poŝtoficejoj (menciite la indeks-numeron de la revuo) aŭ ce la koncernaj asocioj.

La kuracplantekstraktoj de **SZILAS**

gardas la sanon –

pligrandigas la laborkapablon

Szilas

GYÁRTJA:
SZILASMENTI MGTSZ

KAMOMILO
MENTO
PAPRIKO
HISOPO
SALVIO
TIMIANO
HARGUTOJ

Produktas: **SZILASMENTI MGTSZ**
Illóolaj és Gyógynövény üzem

Kerepes, H–2144

Valoraj artobjektoj

porcelano de bona marko

stilmebloj

Varojn aĉetitajn en la subaj vendejoj oni povas sendogane elporti el la lando

VI POVAS AĈETI EL GRANDA SORTIMENTO KONTRAŬ VALUTO INTERNACIE ĴANGEBLA

en niaj vendejoj en Budapesto:
I., Hess András tér 3.
VI., Népköztársaság útja 27. kaj 43.
Hotel Intercontinental - Hotel Gellért

Konsumturist